

V-18679

Esperanto

# JARLIBRO

1955

DU A  
PARTO

RAPORTOJ  
STATUTO  
REGULAROJ

UNIVERSALA  
ESPERANTO-ASOCIO

Verkoj, kiujn la publiko kaj la kritiko unuanime  
akceptis plej favore: D-RO IVO LAPENNA,  
Profesoro de Internacia Publika Juro

*Institut de Droit Comparé de l'Université de Paris*

### CONCEPTIONS SOVIÉTIQUES

de  
DROIT INTERNATIONAL PUBLIC

Publié avec le concours du Centre National de la  
Recherche Scientifique.

Paris, 1954 *Editions A. Pedone* p. 324

13 Rue Soufflot, Paris V., France

Prix de vent 1.800 fr.; frais de port: France 160 fr.,  
Etranger 200 fr.

"... so excellent, dispassionate and thorough in its  
survey of the considerable Soviet literature on inter-  
national law that it easily supersedes the little that has  
been written on the question by United States and  
British scholars." *International Affairs* (Royal Insti-  
tute of International Affairs), London.

### RETORIKO

"Trezo de nia literaturo."—*Norvega Esperantisto*  
Parizo, 1950 p. 216 **Prezo 12 ŝil.**

### AKTUALAJ PROBLEMOJ

"La verko majstre instruas kaj instigas al pensado."  
*Scienca Revuo.*  
Roterdamo, 1952 p. 144 **Prezo 12 ŝil.**

### La Internacia Lingvo—Faktoj Pri Esperanto

"Ĝi posedas grandan valoron pro sia kompleteco  
... koncizeco kaj fidindaj faktoj kaj ciferoj. Libro,  
kiun bezonas ĉiu esperantisto."—*Heroldo.*

Eldono de C.E.D., Londono, 1954  
Lukse bindita, p. 192 **Prezo 10 ŝil.**

*Mendu ĉe:*

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO  
Eendrachtsweg 7, Rotterdam C., Nederlando  
*ĉi ĉe enlanda libroservo*

# JARLIBRO

de la Universala  
Esperanto-Asocio

## 1955

DUA PARTO

La enhavo de ĉi tiu Jarlibro ne  
povas esti represata, ĉu tute, ĉu  
parte, sen la permeso de U.E.A.

Copyright by Universala Esperanto-Asocio  
Eendrachtsweg 7 Rotterdam C. Nederlando

NUR POR UZO DE MEMBROJ

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO  
Eendrachtsweg 7 Rotterdam C. Nederlando

Prof. MIECZ. SYGNARSKI

Ex Libris

L. 278/11

Made and Printed in Great Britain

Leicester Co-operative Printing Society Ltd.

## ENHAVO

Antaŭparolo : Nova Epoko .. .. .	5
Kotizoj 1955 .. .. .	7
Estraro kaj Komitato .. .. .	10
Financoj .. .. .	13
Raportaro de la Estraro :	
Ĝeneralaj Aferoj kaj Kongresoj .. .. .	20
Landaj Asocioj .. .. .	23
Eksteraj Rilatoj .. .. .	24
Kulturaj Aferoj .. .. .	29
Revuo kaj Serva Centro .. .. .	30
Centra Oficejo .. .. .	31
Centro de Esploro kaj Dokumentado .. .. .	33
Raportoj de Landaj kaj Fakaj Asocioj :	
Aliĝintaj Asocioj .. .. .	36
Ne-aliĝintaj Asocioj .. .. .	45
Fakaj Asocioj .. .. .	48
Statuto de U.E.A. .. .. .	51
Regularoj :	
Ĝenerala Regularo .. .. .	59
Servo de Informpeto .. .. .	66
Elekto de Honoraj Membroj .. .. .	68
Kongres-Regularo .. .. .	69
Internacia Somera Universitato .. .. .	75
Belartaj Konkursoj .. .. .	77

**EKDE LA 15-a de NOVEMBRO 1955**

bonvolu direkti ĉion, kion ĝis nun vi  
direktis al la oficejo en HERONSGATE, al:

ADMINISTRA OFICEJO DE  
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

**EENDRACHTSWEG 7**  
**ROTTERDAM-C., NEDERLANDO**

---

*POST LA 15-a de NOVEMBRO 1955*

la adreso de la Direktoro de la

*CENTRO DE ESPLORO*  
*KAŝ DOKUMENTADO estos:*

77 GRASMERE AVENUE,  
WEMBLEY, MIDDX., BRITUJO

## NOVA EPOKO

Nova epoko komenciĝis en la lasta jaro en la historio de la Esperanto-Movado, same kiel en la historio de la mondo. Estas evidente, ke ambaŭ estas firme ligitaj. Precize antaŭ unu jaro komenciĝis la klopodoj ĉe UNESKO en Montevideo, kronitaj de la sukceso konata al ĉiuj. La orient-eŭropa bloko voĉdonis nek kontraŭ nek por la favora Rezolucio. En la daŭro de la jaro, la rilatoj inter la orienta kaj okcidenta influferoj senĉese malstreĉiĝis, kiu fenomeno komencis tuj respeguliĝi en la Esperanto-Movado. Restariĝas la Movado en pluraj orient-eŭropaj landoj. Leviĝas novaj talentoj, resonas malnovaj voĉoj.

Pro ĉio ĉi, pro la esence nova pozicio de la Internacia Lingvo en la mondo post la oficiala rekono de ĝiaj valoroj, kiel ankaŭ pro la reakiro de pluraj dumtempe perditaj landoj, estis necese reorganizi la Asocion kaj doni al ĝi pli larĝajn evolueblecojn.

Post plurjara preparado, la 15-an de Julio 1955 estis akceptita per plimulto de 85% la nova statuto, kiu ebligas ampleksigi la laborojn kaj adapti la Asocion al la novaj cirkonstancoj.

Elirpunkto de la novaj aktivecoj estas la Baza Labor-programo, publikigita en la Junia numero de "Esperanto" kaj unuanime akceptita de la Komitato en Bologna.

Estis maleble, konservi pli longe kiel mondan centron de la Internacia Lingvo oficejon en apenaŭ trovebla vilaĝeto en kamparo, preskaŭ sen ligoj kun la cetera mondo. Tial—kaj ĉar la kondiĉoj multrilate montriĝis favoraj ĝuste tie—en Bologna la Komitato decidis malfermi administran oficejon en Nederlando, nome, en la granda moderna urbo ROTTERDAM. Kiam vi legos tiujn ĉi liniojn, tiu oficejo jam estos funkcianta en unu el la plej dignaj stratoj en la centro de tiu urbo. Por ke estu klara la rolo de tiu oficejo, ni akcentu, ke ĝi traktos ĉiujn aferojn, kiujn ĝis nun traktis la oficejo en Heronsgate. Ĝiaj laboroj estos ampleksaj kaj gravaj, sed deĵoros tie geoficistoj jam dungitaj, kiuj rilatas al nia afero kun granda amo kaj kiuj estas preta plene dediĉi sin al sia tasko.

Dank' al multflankaj aktivecoj de UEA, kiel ankaŭ dank' al sindona laboro de ĉefdelegitoj kaj delegitoj, la membraro daŭre kreskis en la lastaj jaroj kaj atingis en la fino de 1954 la nombron 17.001. Estas antaŭvidite, ke en la fino de tiu ĉi jaro ĝi atingos rekordan ciferon.

Sed, por ke UEA povu sukcese plenumi siajn multnombrajn novajn taskojn, ĝi devos esti ankoraŭ pli forta. Tial ni urĝe apelacias al ĉiu el vi, tuj pagi vian kotizon por la nova jaro kaj, laŭ ebleco, aliĝi kiel membro-abonanto aŭ membro-subtenanto, por ke vi povu ricevi ankaŭ la de monato al monato pli interesan revuon "Esperanto."

Dependas de vi ĉiuj la efektiviĝo de ĉiuj entreprenendaj taskoj. Per unuigintaj fortoj antaŭen!

M. H. VERMAAS, administranto.

## U.E.A. KOTIZOJ 1955

### Klarigo de la tabelo sur la sekvanta paĝo

**MJ (Membro kun Jarlibro)** ricevas membrokarton membro-mark-folion kaj la jarlibron (Unua Parto en Marto; Dua Parto autune).

**MA (Membro-Abonanto)** ricevas membrokarton, membro-mark-folion, la jarlibron kaj la oficialan gazeton *Esperanto*.

**MS (Membro-Subtenanto)** ricevas membrokarton, membro-mark-folion, la jarlibron kaj la oficialan gazeton *Esperanto*. Li afable pagas pli altan kotizon por helpi al U.E.A. finance.

**Patr. (Patrono)** ricevas membrokarton, membro-mark-folion, la jarlibron, kaj la oficialan gazeton *Esperanto*. Li bonvole pagas la kvinoblan MA-kotizon por helpi al pli efika laboro internacia.

**Jarl.** La cifero en ĉi tiu kolono indikas la prezon de tutpaĝa reklamo en la jarlibro. Duonpaĝa aŭ kvaronpaĝa (pli malgranda ne akceptata) reklamo kostas proporcie. La teksto de la reklamo kaj la pago devas atingi la Centran Oficejon plej malfrue la 1an de Novembro por la unua parto, kaj la 15an de Aŭgusto por la dua parto.

**Esp.** La cifero en ĉi tiu kolono indikas la koston de aparta abono al *Esperanto* (sen membreco) por la tuta jaro.

**Ĉiuj kotizoj validas por la kalendara jaro.**

**Dumviva membreco** kostas 20-oble la MA-kotizon.

Oni povas pagi kotizojn al la pagejoj indikitaj, aŭ al la Administra Oficejo:

**Universala Esperanto-Asocio,  
Eendrachtsweg 7 Rotterdam-C. Nederlando**

## KOTIZOJ 1955

Lando	MJ	MA	MS	Patr.	Jarl.	Esp.	Valuto.
Argentino ..	30	80	120	400	320	60	peso,
Aŭstralio ..	7/6	20	30	100	80	15	angl. ŝil.
Aŭstrujo ..	27	72	110	360	300	54	sch.
Belgujo ..	50	140	210	700	600	100	fr.
Brazilo ..	45	120	180	600	480	80	kru.
Britujo ..	7/6	20	30	100	80	15	ŝil.
Danujo ..	7.50	20	30	100	80	15	kr.
Finnlando ..	250	675	—	—	—	—	fmk.
Francujo ..	375	1000	1500	5000	4000	750	fr.
Germanujo ..	4.50	12	18	60	50	9	mk.
Hispanujo ..	35	100	150	500	400	75	pes.
Islando ..	18	46	70	230	180	35	kr.
Italujo ..	675	1800	2700	9000	8000	1350	liroj
Izraelo ..	1.5	4	6	23	16	3	Izr p.
Japanujo ..	390	1040	1550	5200	4200	780	jenoj
Jugoslavujo ..	300	800	1200	4000	3200	600	din.
Kanado ..	1.25	3	4.50	15	12	2	dol.
Maroko ..	375	1000	1500	5000	4000	750	fr. fr.
Nederlando ..	3.75	10	15	50	44	7.50	fl.
Norvegujo ..	7.50	20	30	100	80	15	kr.
Nov-Zelando ..	7/6	20	30	100	80	15	angl. ŝil.
Portugalujo ..	30	80	120	400	320	60	esk.
Sarlando ..	375	1000	1500	5000	4000	750	fr.
Sud-Afriko ..	7/6	20	30	100	80	15	angl. ŝil.
Svedujo ..	5.50	14.50	22	72.5	60	11	kr.
Svislando ..	4.50	12	18	60	50	9	fr.
Urugvajo ..	3	8	12	40	35	6	pes.
Usono ..	1.25	3	4.50	15	12	2	dol.
Venezuelo ..	4	10	15	50	40	8	bol.
Aliaj landoj ..	7.50	20	30	100	80	15	angl. ŝil

## PAGU LA KOTIZON AL

J. C. Milkuschutz, Cap Ramon Freyre 3678, Buenos Aires.  
 Kenneth G. Linton, 11 Poplar Street, South Calfield, S.E.8, Melbourne.  
 F. Höfert, Penzingerstr. 121, Wien XIV/89. Pĉk. 95894.  
 R.B.L.E., Avenue De Bruyn 44, Wilrijk-Antwerpen.  
 F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge. Pĉk. 4161.35.  
 Brazila Esperanto-Ligo, Praca da Republica 54-I, Rio de Janeiro.  
 Brita Esperantista Asocio, 140 Holland Park Avenue, London, W.11.  
 T. Aardestrup, Strandboulevarden 27, København Ø. Pĉk. 29253.  
 Joel Vilkki, Somero. Pĉk. 60253.  
 Union Espérantiste Française, 34 Rue de Chabrol, Paris 10. Pĉk. 855-35.  
 F. Helfers, Postschiessfach 165, (17a) Karlsruhe. Pĉk. 24\*06  
 D. Dalmau, Lauria 98, Barcelona.  
 Fed. de Islandaj Esperantistoj, Posthof 1081, Reykjavik.  
 Itala Esperanto-Federacio, Via Saluzzo 44, Torino.  
 Bernhard Swarsensky, Hess str., Herzlia.  
 Japania Esperanto-Instituto, Hongo Motomati 1-13, Tokio.  
 S-ino E. Lapenna, Nova Ves 32-III, Zagreb.  
 Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko, 114 W.16 St., New York 11, N.Y.  
 L. Apcher, B.P. 204, Meknès.  
 J. Telling, Schietbaanlaan 106, Rotterdam-C. Pĉk. 2426-19.  
 R. Rian, Box 178, Trondheim. Pĉk. 875 34  
 Brendor Clark, Box 18, Leigh, N. Auckland.  
 J. Antunes, Rua dos Fanqueiros 106, 4, dto., Lisboa.  
 Gunter Feis, Hauptstr. 70, Altenwald. Pĉk. Saarbrücken 22887  
 Brita Esperantista Asocio, 170 Holland Park Ave., London, W.11.  
 Sveda Esperanto-Federacio, Tegelbacken, Stockholm C. Poŝtgiro 2012.  
 O. Walder, Eigenheim, Romanshorn. Pĉk. VIII 12139.  
 D-ro R. Zeballos Morales, Fray Marcos (Florida).  
 Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko, 114 W. 16 St., New York 11.  
 N.Y., Usono.  
 L. Moulines, Apartado del Este 4845, Caracas.

aŭ al  
 Universala Esperanto-Asocio  
 Eendrachtsweg 7 Rotterdam-C. Nederlando

# Universala Esperanto-Asocio

## Prezidanto:

Ernfrid Malmgren

## Vic-Prezidanto:

David Kennedy

## Ĝenerala Sekretario:

Prof. D-ro Ivo Lapenna

## Komitato:

Allan, J. T., 12 Lonsdale Crescent, Wellington, E.3, Nov-Zelando.

Azzi, D-ro G., Via XX Settembre 15, Como, Italujo.

Baur, D-ro A., Hangweg 57, Liebefeld-Bern, Svislando.

Borovečki, D-ro I., Buconjićeva 4-II, Zagreb, Jugoslavujo.

Bugge-Paulsen, Kap. R., Dunkersgt. 3-II, Oslo, Norvegujo.

Canuto, Prof. D-ro G., Ospedale Maggiore, Parma, Italujo.

Connor, G. A., 114 West 16 St., New York 11, N.Y., Usono.

Coutinho, D-ro L. de Azeredo, Rua Grao Pará 379, Belo Horizonte, M.G., Brazilo.

Dahl, Einar, Box 900, Uddevala, Svedujo.

Deubler, K., Agnesstrasse 5/III, (13b) München, Germanujo.

Domingues, D-ro C., Rua Alvaro Alvim 27, ap. 61, Rio de Janeiro, Brazilo.

Epstein, F., Haynstrasse 5, (24) Hamburg 20, Germanujo.

Guillaume, J., 8 Rue Camille Saulnier, Le Vesinet (S. et O.), Francujo.

Herrmann, D-ro W., Bürstädter Str. 3, (16) Lampertheim (Hess.), Germanujo.

Herrero, D-ro R., Calvo Sotelo 11, Valencia, Hispanujo.

Höfert, F., Penzingerstr. 121, Wien XIV/89, Aŭstrujo.

Jakob, Hans, Palais Wilson, Genève, Svislando.

Kennedy, D., 21 Westfield Road, Bishop Auckland, Co. Durham, Anglujo.

Kühlmann, G., Prins Jørgensgade 4 A II, København N., Danlando.

Lange, O. C., Fiolstraede 9, København K., Danlando.

Lapenna, Prof. D-ro I., 77, Grasmere Av., Wembley, Mddx. Anglujo.

Llech-Walter, R., 5 Quai Wilson, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

Mabesoone, P. M., Pythagorasstraat 122, Amsterdam O., Nederlando.

Maertens, G., Pr. Leopoldstraat 51, Sint Kruis, Belgujo.

Malmgren, E., Heleneborgsgatan 6, Stockholm, Svedujo.

Maruzzi, D-ro D., Rožna dolina, Cesta XVII/5, Ljubljana, Jugoslavujo.

Oliver, A. C., 120 Heronsgate Road, Chorleywood, Herts., Anglujo.

Petit, P., 26 rue Rochebrune, Rosny-sous-Bois (Seine), Francujo.

Philippe, H., 8 rue Pasteur, Arras (P. de C.), Francujo.

Popović, Prof. B., Zagrebačka 12, Sarajevo, Jugoslavujo.

Rehorić, Z., Srebrnjak 47, Zagreb III, Jugoslavujo.

Reuchlin, R., T 6, 18, (17a) Mannheim, Germanujo.

Sekelj, T., (vojaĝas).

Sellin, K., Blindernveien 60a, Oslo, Norvegujo.

Setälä, Vilho, Esperantotie 4, Matinkylä (Helsinki), Finnlando.

Spruch, D-rino C., Schroersstr. 21, Krefeld, Germanujo.

Strönne, J., Amiralsgatan 36, Malmö, Svedujo.

Timponi, D-ro M., Rua Carlos de Vasconcelos 57, Tijuca, Rio de Janeiro, Brazilo.

Walder, O., Eigenheim, Romanshorn, Svislando.

Zondervan, C. B., Ceintuurbaan 227, Deventer, Nederlando.

## Estraro:

**Prezidanto:** E. Malmgren (Generalaj aferoj, laŭ la Statuto).

**Vic-Prezidanto:** D. Kennedy (Landaj kaj Fakaj Asocioj).

**Ĝenerala Sekretario:** D-ro I. Lapenna (Informaj Fakoj, Eksteraj Rilatoj kaj aliaj taskoj laŭ la Statuto).

R. Llech-Walter (Kongresoj, Revuo, Jarlibro).

P. M. Mabesoone (Administrado, Financoj).

**Administrantino:** F-ino M. H. Vermaas.

Aliĝu aŭ repagu vian kotizon por 1956 kiel  
M.A. aŭ M.S. por ricevi la

## INTERNACIAN REVUON "ESPERANTO"

*Kial?*

Ĉar ĝi

- ★ pritraktas problemojn de Esperantismo;
- ★ alportas valorajn artikolojn de ĝenerala intereso;
- ★ enhavas literaturajn kontribuaĵojn de elstaraj verkistoj;
- ★ donas informojn el la tuta Esperanto-Movado;
- ★ helpas vin orientiĝi en la Esperanto-literaturo per fidindaj librocenzoj;
- ★ publikigas anoncojn kaj reklamojn el la tuta mondo;
- ★ akurate aperadas ĉiumonate;
- ★ per sia Oficiala Informilo kompletigas la Jarlibron;
- ★ estas la oficiala organo de UEA.

**Redaktoro: WILLIAM AULD**

Petu specimenan ekzempleron ĉe

**UNIVERSALA ESPERANTO  
ASOCIO**

**Eendrachtsweg 7,  
ROTTERDAM C., NEDERLANDO**

## Financoj

### Centra Oficejo

#### SPEZOJ 1954

<b>Enspezoj:</b>						£
Kotizoj	AM	..	..	..	..	267
	MJ	..	..	..	..	357
	MA	..	..	..	..	3,502
	MS	..	..	..	..	841
Patronoj	..	..	..	..	..	42
Abonoj	..	..	..	..	..	106
Donacoj	..	..	..	..	..	57
Libroservo-profitoj	..	..	..	..	..	284
Diversaj enspezoj	..	..	..	..	..	15
Kongresa saldo	..	..	..	..	..	127
						<hr/>
						£5,598
						<hr/>
<b>Elspezoj:</b>						£
Salajroj	..	..	..	..	..	1,643
Imposto k. rentumo	..	..	..	..	..	171
Gazeto	..	..	..	..	..	2,025
Afranko	..	..	..	..	..	105
Presaj k. materialoj	..	..	..	..	..	137
Oficejaj elspezoj	..	..	..	..	..	277
Domelspezoj	..	..	..	..	..	97
Jarlibro	..	..	..	..	..	750
Vojaĝelspezoj:						
oficejo	..	..	..	..	..	99
Estraro	..	..	..	..	..	160
Geneva oficejo	..	..	..	..	..	61
Amortizo	..	..	..	..	..	27
Diversaj elspezoj	..	..	..	..	..	26
Akademio	..	..	..	..	..	20
						<hr/>
						£5,598
						<hr/>



## BILANCO 31.12.54

Aktivo:	£	£
Mono en la banko .. .. .		561
Mono en la C.O. .. .. .		2
Domo en Heronsgate .. .. .	2,000	
Pago al BEA .. .. .	250	
		<u>2,250</u>
Ŝuldantoj .. .. .		2,564
Meblaro kaj maŝinoj .. .. .		440
Libroprovizo .. .. .		477
		<u>£6,294</u>

Pasivo:	£	£
Kreditoroj: liverantoj .. .. .		856
konthavantoj .. .. .		2,309
Kotizoj antaŭpagitaj .. .. .		1,189
Propaganda konto .. .. .		105
Kapitala konto:		
1.I.54 .. .. .	1,524	
DM-kotizoj 1954 .. .. .	311	
		<u>1,835</u>
		<u>£6,294</u>

Stato de la Eldona Fondaĵo je 31.XII.54:	£	ŝ.	p.
Kapitalo .. .. .	300	0	0
Enspezoj .. .. .	68	5	4
Librostoko .. .. .	360	0	0
	<u>£728</u>	<u>5</u>	<u>4</u>

	£	ŝ.	p.
Eldona Fondaĵo .. .. .	300	0	0
Kosto de "Internacia Lingvo" .. .. .	343	12	3
Gajno de la Fondaĵo .. .. .	84	13	1
	<u>£728</u>	<u>5</u>	<u>4</u>

Mi kontrolis la supran Bilancon, datumitan 31an Decembron 1954, kune kun la Spezoj por la jaro finiĝinta 31an Decembron 1954, kaj mi havigis ĉiujn informojn kaj klarigojn kiujn mi postulis. Mia opinio la bilanco estas tiel aranĝita, ke ĝi ĝuste montras la staton de la aferoj de la

Centra Oficejo de la Asocio, laŭ mia plej bona informo kaj laŭ la klarigoj al mi donitaj, tian kia ĝi estas montrita en la kontlibroj de la Asocio.

(Subskribita) H. MILSOM, F.C.I.S., A.T.I.I.

17an Januaron, 1955.

## Serva Centro

### SPEZOJ 1954

Enspezoj:	Svis. frcs.
Saldo de jaro 1953 .. .. .	87:87
Subvencio 1954 .. .. .	750:—
Rentumo .. .. .	343:85
Perdo, transportota al 1955 .. .. .	475:98
	<u>1.657:70</u>

### Elspezoj:

Luo, purigo, asekuro k.t.p. .. .. .	268:—
Oficejaj elspezoj .. .. .	373:55
Afranko, dogano k.t.p. .. .. .	368:85
Vojaĝkostoj .. .. .	107:25
Materialo .. .. .	106:65
Biblioteko .. .. .	148:50
Diversaĵoj .. .. .	284:90
	<u>1.657:70</u>

## FONDAĴO H. HODLER

Obligacioj usonaj .. .. .	6.460:—
En svisa banko .. .. .	8.540:—
	<u>15.000:—</u>

### RENTUMO 1954

Rentumo .. .. .	343:85	343:85
Pago al Serva Centro .. .. .	343:85	
	<u>343:85</u>	<u>343:85</u>

HANS JAKOB

Genève, 31an de decembro 1954.

Hon. Administranto.

Komisiitaj de la Prezidanto de UEA ni, subskribintoj,

kunvenis la 8an de marto 1955 en Genevo por kontroli la jarkalkulon kaj bilancon de la Serva Centro de UEA.

Ni kontrolis la dokumentojn de la librotenado kaj komparis ilin kun la enskriboj en la taglibro. Ni konstatis la ekzaktecon de la dokumentoj pri Fondaĵo H. Hodler kaj trovis ĉion en bona ordo.

Ni proponas akcepti la bilancon pri 1954 kun meritita danko al la Honora Administranto.

8an de marto 1955. *Emile Ĉurtenaz; Madeleine Stakian.*

### Garantia Fondaĵo de UEA (Administranto: La Prezidanto)

#### SPEZOJ 1954

Enspezoj:	<i>Sved. Kr.</i>
Donacoj anonime ricevitaĵ (17/4=£37; 28/4=£137; 12/5=£26) .. ..	2.900:—
Donaco de kanadaj obligacioj je valoro de 9.000:— kanad. dol. .. ..	45.000:—
Rentumo 1954 de sveda banko .. ..	379:12
Rentumo 1954 de la obligacioj. 1.219:50 sv. frcs. .. ..	1.400:—
	<u>49.679:12</u>

#### Elspezoj:

Kostoj por prezenti Esperanton ĉe la UNESKO-konferenco, £200 .. ..	2.900:—
Al la Kapitalo .. ..	46.779:12
	<u>49.679:12</u>

#### BILANCO

Aktivaj:	31.12.53	31.12.54
En sveda banko .. ..	15.102:09	15.471:21
En svisa banko, 1.219:50 sv. frcs.	—:—	1.400:—
Kanadaj obligacioj, nom. 9.000:— kan. dol. .. ..	—:—	45.000:—
	<u>15.102:09</u>	<u>61.871:21</u>
<b>Pasivaj:</b>		
Kapitalo .. ..	15.102:09	61.871:21

## 39a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

HAARLEM, 1954

Enspezoj	Gld.
Kongresaj Kotizoj .. ..	35.793.19
Loĝiga servo .. ..	1.161.43
Ekskursaj servo .. ..	2.904.93
Donacoj .. ..	664.39
Anoncoj .. ..	715.48
Rentumo .. ..	36.92

Elspezoj	Gld.
Licencpago .. ..	5.370.79
Kongresejo .. ..	810.50
Afranko .. ..	1.516.13
Presado .. ..	572.44
Materialoj .. ..	1.191.15
Salajro .. ..	5.869.04
Vojaĝelspezoj .. ..	529.05
Sekretariejo .. ..	1.151.21
Propagando .. ..	491.19
Transporto .. ..	107.48
Oficiala bulteno .. ..	352.40
Kongresa Libro .. ..	4.500.23
Insigno .. ..	885.40
Gazetara Servo .. ..	742.24
I.S.U. .. ..	655.35
Telefono .. ..	202.12
Festaj aranĝoj .. ..	6.170.54
Diversaj elspezoj .. ..	429.57
Saldo .. ..	9.729.51

Gld. 41.276.34 Gld. 41.276.34

Gld. 10.64—£1 angla

Revizoroj:

B. J. J. Albers.

H. Wensel

## SPEZOJ DE CED POR LA PERIODO

1.I.-31.XII. 1954

	<i>Enspezoj</i>			<i>Elspezoj</i>		
	£	ŝ.	p.	£	ŝ.	p.
Saldo de la 31-XII-1953 ..	10	19	6			
Donacoj .. .. .	55	19	4			
Subvencio de UEA* .. ..	506	16	11			
Skribmaterialo .. .. .				23	19	2
Poŝtelspezoj, telefono .. ..				27	19	8
Oficejaj elspezoj (luo, hejtado, lumigo) .. .. .				112	4	3
Salajro, vojaĝkompensoj .. ..				378	7	1
Libroj, dokumentoj k aliaj elspezoj .. .. .				63	0	3
	573	15	9	605	10	5
Negativa saldo .. .. .	31	14	8			
	£605	10	5	£605	10	5

\*£30 el Propaganda Konto 1955.


### Budĝetpropono de CED por la jaro 1956:

Salajro de la oficistino por 12 monatoj .. ..	384
Skribmaterialo .. .. .	50
Poŝtelspezoj .. .. .	40
Oficejaj elspezoj (luo, hejtado, lumigo) .. ..	120
Diversaj malgrandaj elspezoj .. .. .	30
	£624

La antaŭviditaj elspezoj estas taksitaj kiel minimumaj. La elspezojn oni povas kovri parte el donacoj, parte el propaganda konto aŭ fondaĵo UEA, parte el eventuala profito de la kongreso.

En Londono, la 2-an de Junio, 1955.

PROF. D-RO IVO LAPENNA,  
*Honorofica direktoro de la Centro  
de Esploro kaj Dokumentado.*



*Ĉu vi serĉas  
sencon de la vivo?*

Per sia spiritscienca instituto Martinus donas respondon—en klaraj kaj ekzaktaj analizoj—al ĉiuj demandoj, kiujn povas fari intelekta homo, kiu serĉas la veron pri vivo kaj universo.

Se vi deziras, ni informos detale pri la jam aperintaj libroj de Martinus.

**La SPIRITSCIENCA INSTITUTO de MARTINUS**

*Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F., Danujo.*

## RAPORTARO DE LA ESTRARO DE UEA PRI LA AGADJARO 1954-1955

### Ĝeneralaj aferoj kaj kongresoj (La Prezidanto de UEA)

Dum la pasinta jaro nia asocio havis diversajn gravajn problemojn, kiuj necesigis grandan aktivecon. La ĉefa interna problemo estis la traktado de la statutpropono, kaj la ĉion alian superanta ekstera problemo estis la prezentado de nia lingvo antaŭ la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo. Flanke de tiuj elstaraj aferoj UEA pere de siaj CO, SC kaj CED daŭrigis sian kutiman aktivecon: la eldonadon de la revuo kaj jarlibro, la informadon, la gazetaran servon, la administradon de la delegita servo k.t.p.

**Konsisto de la Estraro.** La estraranoj estris la fakojn jene: Prezidanto E. Malmgren, ĝeneralajn aferojn kaj kongresojn; Vicprezidanto D. Kennedy, landajn asociojn; J. Guillaume, kulturajn problemojn (literaturon, radion, konkursojn k.t.p.); Hans Jakob, Revuon, servojn kaj Servan Centron; D-ro P. Kempeneers, fakajn asociojn; D-ron Ivo Lapenna, eksterajn rilatojn, informadon kaj Centron de Esploroj kaj Dokumentado; A. C. Oliver, administradon, financojn kaj memprovarbadon.

La Estraro kunsidis dum la pasko kaj okaze de la Universala Kongreso en Haarlem.

**Komitato.** La Komitato konsistis el 37 membroj, el kiuj 27 estis elektitaj de la Landaj Asocioj, 3 de la Delegitoj kaj 7 alektitaj. Dum la Kongreso en Haarlem la Komitato havis kvin ĝeneralajn kunsidojn. Krome la diversaj komisionoj de la Komitato plurfoje kunsidis. Partoprenis la kunsidojn 22 komitatanoj kaj 7 anstataŭantoj de komitatanoj.

**Landaj Asocioj.** UEA konsistas el 21 aliĝintaj landaj asocioj, kun kiuj estas bona kontakto per leteroj, cirkuleroj kaj informoj en nia revuo. Pri la agado de la landaj asocioj raportas la Vicprezidanto.

**Fakaj Asocioj.** UEA havas kontrakton pri kunlaboro kun 11 fakaj asocioj. Pri la agado raportas estrarano S-ro D. Kennedy.

**Honoraj Membroj.** Dum la Kongreso en Haarlem la Komitato elektis kiel honorajn membrojn S-ron C. C. Goldsmith, D-ron Dworschak kaj D-ron Frenzel.

**Rilatoj kun estraranoj kaj ĝenerale kun la esperantistaro.** Al la estraranoj mi dissendis 20 cirkulerojn; krome multaj problemoj necesigis viglan leterkontakton. En tiu ĉi jaro mia korespondado kun la komitatanoj estis ampleksa, kaj mi kun ĝojo konstatas ilian aktivecon. Entute mia korespondado kiel prezidanto ampleksis en la jaro pli ol 600 senditajn leterojn kaj aldone cirkulerojn al estraranoj, komitatanoj kaj landaj asocioj.

**Centra Oficejo.** Post 18-jara ofico kiel Ĝenerala Sekretario emeritiĝis meritoplena C. C. Goldsmith la 16-an de novembro 1954. Provizora Ĝenerala Sekretario estis elektita S-ro J. Rapley.

Antaŭ la estrarkunsido en marto 1955 mi vizitis la Centran Oficejon, trarigardis la kaslibrojn kaj la kvitancojn por la jaro 1954 kaj konstatis, ke la spezoj estas kontentige dokumentitaj, ke la elspezoj estas moderaj kaj ke la financaj intereso de la asocio estas bone prizorgitaj. La inventario je 31 decembro 1954 montras: (a) ke la librostoko estas notita je aĉetprezoj aŭ je reduktitaj prezoj por neaktualaj libroj, (b) ke la meblaro kaj oficejaj aparatoj je la fino de 1954 havas valoron de £440 post amortizo de £26 13s. 0p. La domo kaj la inventaroj estas kontentige asekuritaj.

En aparta raporto de la Sekretario estas detala raporto pri CO.

**CED.** La 18 marto 1955 mi vizitis la oficejon de CED, informiĝis pri la teknikaj laboroj kaj instalaĵoj, ekzamenis la kaslibrojn kaj trovis la elspezojn malaltaj kompare al la ampleksa laboro farita.

Pri la agado kaj la spezoj de CED raportas estrarano D-ro Lapenna.

**Fondaĵoj.** Pri la Garantia Fondaĵo de UEA kaj Fondaĵo Montevideo vidu apartan financan raporton.

**Statuto de UEA.** La Komitato je la kunsidoj en Haarlem decidis okazigi Ĝeneralan Voĉdonon pri nova statuto. Je tiu voĉdono la statutpropono ne kolektis la necesan plimulton de  $\frac{2}{3}$  de la voĉoj, ĉar 11.262 membroj voĉdonis por, kaj 4.412 kontraŭ. En marto 1955 la Komitato per plimulto decidis okazigi novan Ĝeneralan Voĉdonon pri la statuto post kelkaj ŝanĝoj de diversaj paragrafoj en la antaŭa statutpropono.

**Universalaj kongresoj.** Al la sukcesinta kongreso en Haarlem aliĝis 2.353 personoj, la plej alta nombro post la mondmilito. Bedaŭrinde mi persone ne povis ĉeesti pro

malsano, sed Vicprezidanto S-ro D. Kennedy ricevis multan laŭdon pro sia deĵoro kiel funkcia Prezidanto.

Du ĝeneralaj kunvenoj en la Haarlema kongreso traktis la temon "La Internacia lingvo antaŭ UNESKO. Kultura kaj politika aspektoj". En la Internacia Somera Universitato prelegis 11 sciencistoj. Gazetara Servo dum la kongreso faris modelan laboron.

Dum la jaro nia Konstanta Kongresa Sekretario S-ro Mason Stuttard konstante informis min pri la aktuala stato koncerne la kongresaranĝojn. La preparoj por la Jubilea Kongreso de Bologna bone evoluigas. Laŭ mia propono oni en la kadro de la programo aranĝos i.a. "Jubilean Vesperon" kun mozaika trarigardo de nia movado dum la pasintaj jardekoj. Okazos en la kongreso ankaŭ teatra vespero. Ĝis marto 1955 aliĝis al la kongreso 1.000 personoj.

**UNESKO.** Kiel Prezidanto mi havis konstantan korespondadon kun estrarano D-ro Lapenna, kiu kun talento zorgis pri la reprezentado de UEA je la traktadoj kun UNESKO. Dum la jaro ni interŝanĝis entute ne malpli ol proks. 300 dense maŝinskribitajn leterpaĝojn, el kiuj granda parto temis pri Esperanto antaŭ UNESKO. Pri la traktadoj en la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo informas estrarano D-ro Lapenna en sia raporto.

Ĉar estas necese fari laŭcelan laborplanon por utiligi la rezultojn ĉe UNESKO: (a) la konfirmon pri la kultura valoro de nia lingvo, (b) la akcepton de UEA kun konsulta pozicio en UNESKO, mi instigis ĉiujn Estraranojn prezenti siajn proponojn. La Estraro diskutos ilin kaj prezentos la programon al la Komitato en la kongreso de Bologna.

**Esperanto en lernejoj.** Ĉar la menciita decido de UNESKO donas al nia lingvo novajn ŝancojn enpenetri en la lernejojn, mi turnis min al pluraj landaj asocioj kaj al nia kunlaboranta Instruista asocio por ricevi koncizajn kaj dokumentitajn informojn pri la jam ekzistantaj leĝoj, kiuj iel tuŝas la Esperanto-instruadon. La intenco estas kombini tiujn faktojn kun la celo prezenti al la landaj asocioj pretan materialon je proponoj al registaroj kaj/aŭ parlamentoj en pluraj landoj samtempe proponante pli ampleksan instruadon de Esperanto en lernejoj, eventuale kiel libervolan temon en t.n. "provlernejoj," kiaj nuntempe troviĝas en pluraj landoj.

**Aktivigo de la Landaj Asocioj.** Ĉar mi konstatis, ke en la lastaj 10 jaroj proksimume kvin landaj asocioj grave kreskis aŭ havis konsiderindan aktivecon, mi petis al la prezidantoj de tiuj asocioj fari raporton pri la laborsistemo uzita. Mi promesis dissendi tiujn raportojn al ĉiuj landaj asocioj, por ke ĉiuj povu utiligi la bonajn spertojn. Estas mia espero, ke ĉiu landa estraro kun intereso kaj atento studos la raportojn, por ke tiuj instigu al pli granda aktiveco. Mi jam dissendis la norvegan, italan kaj jugoslavian raportojn. Krome la Sveda Federacio laŭ mia peto dissendis raporton kun statistiko pri Esperanto-kursoj en Svedujo dum la studjaro 1953-54.

**Pacpremio de Nobel.** La propono, kiun en januaro 1954 la norvega parlamentano Carl Henry prezentis al la Norvega parlamento pri la pacpremio 1954 al UEA, ne estis akceptita. En januaro 1955 la sveda parlamentano, nia UEA-komitato Einar Dahl, ripetis la proponon al la Norvega parlamento pri la pacpremio 1955.

**Finvortoj.** La nun pasinta jaro estis enhavoriĉa, eĉ epokfaranta, pro la sukcesoj ĉe UNESKO. Nian movadon hodiaŭ subtenas tiom da talentaj, lertaj, energiaj, oferemaj samideanoj, ke ni kun optimismo povas renkonti la estontecon. Kaj al vi ĉiuj, kiuj en estraroj, komitatoj, oficejoj, lernejoj k.t.p. kun flamo kaj entuziasmo laboras por nia afero, mi esprimas sinceran kaj varman dankon en la nomo de UEA.

## Landaj Asocioj (D. Kennedy)

Ĝis la 19a de marto alvenis raportoj el 14 landaj asocioj. Laŭ tiuj raportoj, en multaj landoj bone funkcias korespondaj kursoj kaj gazetaraj servoj. Kelkaj landoj utiligis la servojn de la lertaj Esperantistaj vojaĝantoj, S-roj Pragano kaj Sekelj, kiuj faris prelegojn en diversaj urboj kun granda sukceso.

En pluraj landoj, kiuj apude kuŝas, komuna agado rezultigis novan intereson kaj pli viglajn kontaktojn, precipe rilate al komunaj konferencoj kaj komunaj aranĝoj en la aperigo de naciaj E-gazetoj.

Dum la jaro oni propagandis per diversspecaj novaj propagandfolioj kaj per fonograf-disko. Evidentiĝas ankaŭ,

ke oni pli intense laboras inter junularaj rondoj. Okazis reciproka interŝanĝo de junularoj, nome metio-lernantoj el Mostar, Jugoslavujo, kun francaj geknaboj el Sudfrancujo.

Inter la edukadaj eksperimentoj kiuj daŭre progresas kaj sukcesas, ni menciuj tiun en la Denton lernejo en Anglujo, kie la lernejoj studas Esperanton kiel klastemon dum la jaro kaj somere praktike uzas ĝin dum siaj feriaj aŭtobusaj ekskursoj al diversaj landoj de Eŭropo. La nova edukada eksperimento en Midlothian, Skotlando, ankaŭ bone progresas, kaj dua "ondo" da geknaboj baldaŭ partoprenos en ĉi tiu interesa aranĝo. La japana edukada eksperimento kun celo prezenti la infanojn de la mondo al la japanaj infanoj, per la helpo de Esperanto kiel perilo de informoj, ĝis nun bonege progresas.

Por helpi al niaj lokaj grupoj, baldaŭ aperos en nia gazeto "Esperanto" resumo pri la valora lastjara konferenco en Helsingør, Danlando, en kiu la konferencanoj pritraktis la temon: "La laboro de la grupoj." Por konigi al la grupoj la laboron kaj valoron de UEA mi preparas novan paroladon sub la titolo: "UEA—ĝiaj valoro kaj laboro." Tiu parolado estos baldaŭ je la dispono de la grupoj.

## Eksteraj Rilatoj kaj Informado, kaj pri la ISU

(D-ro I. Lapenna)

### 1. Eksteraj rilatoj.

(a) **UNESKO-ĝenerale.** La ĉefa klopodo en la pasinta laborjaro koncernis la plifirmigon de la rilatoj kun UNESKO kaj la organizon de la reprezentigo de la Asocio ĉe la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo. En la servon de tiu celo estis metitaj ankaŭ la aktivecoj de CED, de la Informa Fakto, de la Internacia Gazetara Servo kaj parte eĉ de la Internacia Somera Universitato. En tiu ĉi afero kunlaboris entute 42 kunlaborantoj por 68 landoj. Kun la aŭtoritatoj de la landoj, por kiuj la fakto ne havis kunlaborantojn, la Asocio rekte rilatis. Per specialaj cirkuleroj (entute 7) la kunlaborantoj estis regule informataj pri la evoluo kaj konsilataj kiel agi. La korespondado ampleksas ĉ. 1.500 leterojn.

(b) **Reprezentigo en Montevideo.** La estrarano pri Eksteraj Rilatoj partoprenis en la laboroj de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo. Li estis tie de

la 1-a de Novembro ĝis la 17-a de Decembro 1954. Per decido de la Ĝenerala Konferenco de la 13-a de Novembro li estis allasita kiel observanto de la Asocio.

(c) **Konsultaj aranĝoj.** Surbaze de speciala petskribo, post rekomendo fare de la Plenumkomitato de UNESKO, la Ĝenerala Konferenco decidis la 8-an de Decembro 1954 konsenti al UEA la konsultajn aranĝojn.

(d) **Peticio.** La 10-an de Decembro 1954 la Ĝenerala Konferenco de UNESKO akceptis Rezolucion favore al Esperanto. La originala Teksto de la Rezolucio troviĝas en la revuo "Esperanto," februara numero.

(e) **Konsultaj aranĝoj kun UN.** Kiel sekvo de la konsultaj aranĝoj kun UNESKO, la Asocio estas aŭtomate registrita por konsultaj aranĝoj kun la Ekonomia kaj Socia Konsilo de Unuiĝintaj Nacioj. Pri tio la Asocio estis informita per la letero ECA/10 de la 15-1 de Januaro 1955, konfirmita per la letero de la Asocio de la 22-a de Februaro 1955.

(f) **Reprezentigo en la Konferenco por kontraŭbatali la diskriminacion.** Kiel unu el la sekvoj de la konsultaj aranĝoj, la Asocio estas invitita reprezentigi en la konferenco de neregistaraj organizaĵoj, okazonta en Ĝenevo de la 31-a de Marto ĝis la 4-a de Aprilo 1955. La konferenco, organizita de la Ekonomia kaj Socia Konsilo de UN pritraktos la demandon "pri la plej efektivaj metodoj por kontraŭbatali antaŭjuĝojn kaj diskriminacion." Laŭ la propono de la estrarano pri Eksteraj Rilatoj, la Estraro komisiis al Sinjoro Ralph Harry, Ĝen. konsulo de Aŭstralio en Ĝenevo, reprezenti la Asocion; kunreprezentanto estu S-ro Hans Jakob.

(g) **Eŭropa Konsilantaro.** Laŭ la peto de Sinjoro Petit la fako sendis la 23-an de Septembro 1954 cirkuleran leteron al la landaj asocioj de Eŭropo kun sugesto entrepreni aktivecon ĉe sialandaj eŭropaj instancoj pri eksperimenta instruado de Esperanto en kelkaj lernejoj sub la aŭspicioj de la Eŭropa Konsilantaro. Provizore tiu ĉi klopodo stagnas, sed oni povas ĝin en ĉiu momento renovigi.

(h) **U.A.I.** La rilatoj kun la Unio de Asocioj Internaciaj kun sidejo en Bruxelles estas daŭre bonaj kaj viglaj. La bulateno de tiu asocio "Bulletin N.G.O.-O.N.G." aperigis ankaŭ en la pasinta jaro plurajn informojn pri Esperantaj kongresoj, konferencoj kaj aliaj aranĝoj.

(i) **Aliaj rilatoj.** Okaze de la UNESKO-Konferenco

en Montevideo, la observanto havis la okazon partopreni en la laboro de pluraj kunvenoj de neregistaraj organizaĵoj. Same tiel li kontaktis multajn delegaciojn, kio kontribuis al firmigo de la pozicioj de la Asocio. Aliflanke estas menciinde, ke la fako invitis UNESKO-n kaj 8 grandajn internaciajn organizaĵojn sendi siajn reprezentantojn al la Universala Kongreso en Haarlem. Unu el tiuj organizaĵoj —la Monda Movado por Monda Federacia Registaro— sendis sian reprezentanton al la Kongreso, dum la aliaj direktis al la Kongreso salutleterojn kaj bondezirojn. Post la Kongreso la fako sendis al UNESKO, UN, ĉiuj invititaj organizaĵoj kaj ĉiuj registaroj, kiuj estis reprezentitaj en la Kongreso, specialan koncizan raporton en la angla lingvo pri la laboroj de la Kongreso.

(j) **Raporto pri la atingoj en Montevideo.** Pri la signifo de la decidoj de UNESKO en Montevideo, kiel ankaŭ pri la diversaj okazaĵoj dum la Konferenco, aperis artikoloj kaj dokumentoj en la Februara numero de "Esperanto" kiu tial povas esti konsiderata kiel konsista parto de tiu ĉi raporto.

(k) **Pluaj taskoj.** En tiu ĉi fako estas plenumendaj jenaj taskoj: (1) klopodo havigi al la Asocio konsultajn aranĝojn kun la Eŭropa Konsilantaro; (2) inviti al la Kongreso en Bologna UN, UNESKO-n, kaj minimume 10 gravajn organizaĵojn; (3) starigi rilatojn kun la internaciaj organizaĵoj de Ameriko kaj kun la aziaj landoj.

(2) **Informado.** Plenumante la laborplanon, aprobitan de la Komitato en Haarlem, la fako efektivigis jenajn taskojn:

(a) **Kunveno de Informaj fakoj.** La kunveno okazis en Haarlem, la 4-an de Aŭgusto 1954. Ĉeestis reprezentantoj de la belga, flandra, dana, franca, itala, jugoslavia, germana, nederlanda, sveda kaj svisa informaj fakoj. La kunveno diskutis la raporton de la Informa Fako de UEA, priparolis la formojn de plua kunlaborado, precipe rilate la gazetaran kampanjon antaŭ Montevideo kaj eldonon de 6-lingva faldfolio. Ĝi ankaŭ akceptis la proponon de Sinjoro Lange pri komuna devizo. La protokolo de la kunveno estas sendita al ĉiuj informaj fakoj por ke ili povu agi laŭ la konsilioj entenitaj en ĝi.

(b) **Artikoloj antaŭ kaj dum la UNESKO-Konferenco.** Per cirkulera letero 11/1954 de la 3-a de Oktobro estas

senditaj 3 artikoloj al ĉiuj landaj informaj fakoj, al kunlaborantoj en la UNESKO-afero kaj al ricevantoj de la bulteno de la IGS. La artikoloj aperis ĉu komplete ĉu en mallongigita formo en la naciaj lingvoj de multaj landoj. Estas menciinde, ke pri la temo "Esperanto-UNESKO" aperis inter la Pariza Konferenco de 1952 kaj la Montevidea de 1954 ĉ. 1,500 artikoloj en gazetoj kaj revuoj de la mondo. Dum la Konferenco en Montevideo estis publikigataj pliaj ĉ. 1,000 artikoloj kaj artikoletoj. La nombro de informoj, aperintaj post la akcepto de la Rezolucio, estas nekontrolebla, sed certe ĝi atingas plurajn milojn, ĉar la ĉefaj presagentejoj de la mondo diskonigis la novaĵojn. Ankaŭ multaj radiostacioj raportis. Speciala artikolo pri la signifo de la decidoj en Montevideo estas liverita en Januaro.

(c) **IGS.** La Informa Fako daŭrigis la eldonadon de la Bulteno de la Internacia Gazetara Servo. Ĝis la 1-a de Marto entute aperis 33 numeroj. La Bulteno estas sendata al 62 kunlaborantoj en Argentino, Belgujo, Bolivio, Brazilo, Britujo, Danlando, Finnlando, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Hindujo, Islando, Italujo, Jugoslavio, Kostariko, Meksikio, Nederlando, Norvegio, Novzelando, Saarlando, Svedujo, Svislando, Urugvajo kaj Usono. Krome, al ĉiuj komitatanoj de UEA. En la lasta laborjaro estis multe akcentata la fakto, ke UNESKO okupiĝas pri la Peticio favore al Esperanto.

(d) **Gazetara Servo en Haarlem.** Ankaŭ dum la pasinta kongreso funkciis la gazetara servo, iniciatita unue de la Pariza kongreso en 1950. Ĝi eldonis ĉiutage tre bonan bultenon en la nederlanda kaj Esperanta lingvoj. La gazetaro, precipe de Nederlando, abunde raportis.

(e) **Propaganda vojaĝo de Tibor Sekelj.** Komitatano Tibor Sekelj faris prelegvojaĝon en Italujo kaj Jugoslavio. En Italujo li faris 18 prelegojn en 12 urboj kun ĉeesto de entute ĉ. 3,000 personoj. Li prelegis en Esperanto pri siaj esplorvojaĝoj en Suda Ameriko. En Jugoslavio li faris pri la sama temo 42 prelegojn en 22 lokoj kaj krome 4 paroladojn pri Esperanto. Ĉeestis entute ĉ. 24,000 personoj kaj aperis en la gazetoj ĉ. 250 raportoj, el kiuj 80 menciis Esperanton. Nun Sinjoro Sekelj prelegas en diversaj urboj de Britujo kaj komence de Aprilo li entreprenos la grandan propagandan vojaĝon de 2 jaroj en la landoj de Proksima Oriento. La Informa Fako disponigis al li ĉiujn duoblaĵojn de libroj senditaj al la Unua Universala

Ekspozicio de Esperanto en Montevideo. Mi memorigas, ke la Estraro decidis dum la Paskaj kunsidoj 1954 nomi Sinjoron Sekelj "Speciala sendito de UEA" por tiu vojaĝo.

(f) **Mondfederalisma kongreso.** Dank' al la klopodoj de Sinjorino Isbrucker kaj de la estrarano pri informado la Kongreso por Mondfederalismo, okazinta en Londono de la 30-a de Aŭgusto ĝis la 3-a de Septembro 1954 akceptis rezolucion en kiu estas esprimita apogo al la konata Peticio favore al Esperanto. La rezolucio estas sendita al UNESKO.

(g) **Landaj informaj fakoj.** Entute funkcias 25 landaj informaj fakoj. Ilia laboro estas de jaro al jaro pli bona kaj efika. La landaj informaj fakoj ankaŭ rekte interŝanĝas siajn bultenojn kaj publikaĵojn, kio multe kontribuas al plibonigo de la informado.

(h) **Aliaj laboroj.** La Unua Universala Ekspozicio de Esperanto, organizita de la Urugvaja Esperanto-Societo en kunlaboro kun CED, havis, krom la dokumenta valoro, ankaŭ grandan signifon el vidpunkto de informado en Montevideo kaj ĝenerale en Urugvajo. Ĝin vizitis ĉ. 12,000 personoj. Nun la Ekspozicio estas propraĵo de UEA kaj pri ĝi plue devas okupiĝi la Informa Fakoj. Alia grava aktiveco estis aperigo de serio de artikoloj, verkitaj de la estrarano pri Informado, en la gazeto "Heroldo de Esperanto," ĉiam sub la sama rubriko: "Defendo de la Lingvo Esperanto." Tiuj artikoloj estis tradukitaj en plurajn lingvojn kaj publikigitaj en diversaj nacilingvaj gazetoj.

(i) **Taskoj.** La taskoj plenumendaj en tiu ĉi fakoj estas: (1) Eldono de 6-lingva propaganda faldfolio (la teksto estas jam preta kaj ankaŭ la financaj rimedoj trovitaj; necesas tradukigi la tekston en la 6 lingvojn, presigi la faldprospekton, distribui ĝin bone kaj, ĉefe, prizorgi ke ĝi estu disdonita al membroj de internaciaj kongresoj kaj konferencoj neesperantistaj); (2) Kunmeto de statistiko pri la informa laboro farita en 1954 (tiucele estas necese dissendi demandojn al ĉiuj informaj fakoj, kaj, surbaze de la respondoj, kunmeti la statistikon kaj fari analizon por povi ne nur konstati la progreson aŭ regreson, sed ankaŭ doni konsilojn por la estonta laboro); (3) Utiligo de la Montevidea Ekspozicio por organizo de sama Ekspozicio en diversaj lokoj de Eŭropo (la ekspozicia materialo estas bonega kaj oni devus

ĉirkuligi la Ekspozicion de loko al loko, precipe aranĝante ĝin en tiuj lokoj, en kiuj ni entreprenas ian specialan kampanjon: mi pensas unuavice al Strasbourg, se la Asocio petos konsultajn aranĝojn kun la Eŭropa Konsilantaro kaj intencas fari seriozajn paŝojn ĉe tiu instanco); (4) Estas nepre necese penetri en la landojn de Azio, en kiuj praktike ne ekzistas Esperanto-Movado kun la escepto de Japanujo kaj Indonezio (tiucele oni devas doni kiel eble plej grandan helpon al Sinjoro Sekelj kaj esti kun li en konstanta kontakto).

3. **Internacia Somera Universitato.** Post la ekŝigo el tiu funkcio mi transdonis la 4-an de Marto la pluan gvidadon al Sinjoro Rosbach. Ĝis la 1-a de Marto 6 profesoroj kaj aliaj prelegantoj deklaris sin pretaj prelegi. Pri tio mi informis Sinjoron Rosbach, kaj sendis al li la tutan necesan materialon por gvidi la fakojn.

Ekde la 1-a de Marto 1955 mi ekŝigis el la fakoj Eksteraj Rilatoj kaj Informado, kiel ankaŭ el la funkcio de sekretario de la ISU pro kaŭzoj menciitaj en mia ĉirkulera letero de la 4-a de Februaro. Ĝis la Kongreso en Bologna mi plue okupiĝos pri la rilatoj kun UNESKO kaj UN.

## Kulturaj aferoj

### Literaturo, radio, konkursoj, k.t.p.

#### (J. Guillaume)

**Kluba vivo.** La kluba vivo estas grava por nia movado, ĉar en la kluboj oni devas entrepreni aktivecon rilate al kulturo, instruado, propagando k.t.p. Ni do devas stimuli la klubojn, alportante novajn ideojn. Mi provis iniciati interŝanĝon de paroladoj kaj komencis en la kluboj de Londono, Malmö, Kopenhago kaj Zagreb. Certe ni povus ricevi interesajn prelegojn ankaŭ de aliaj kluboj, kaj krome ni povus utiligi la paroladojn de la Somera Universitato kun permeso de la aŭtoroj. S-ro Jan Strönnen en Malmö sendis al ni teatraĵetojn, kiujn ni uzos. Mi ankaŭ preparis pri la laboro de la grupoj la jenajn artikolojn publikigotajn en nia revuo: "La plej bonaj metodoj por instrui la lingvon," "Allogaj programoj," "Eksteraj Rilatoj," "Konsiloj por la financoj" kaj "Ĝenerala informado al la publiko."

**Literaturo.** Mi intencas fari enketon pri la dezirindeco publikigi novajn eldonojn de gravaj verkoj nun elĉerpitaj.



Estas ja konate, ke la Franca Centra Librejo, kreita de Generalo Sébert, ne plu funkcias. Nepre represotaj estas la verkoj de D-ro Zamenhof. La brita eldonejo jam represis la Fundamentan Krestomation en deca vesto. Grave estas, ke estu konkordo inter la diversaj eldonistoj por eviti plurajn samtempajn eldonojn de la sama verko.

**Radio.** S-ro Larglantier ellaboris statistikon pri la Esperantaj elsendoj en 1954, publikigitan en "Esperanto" marton 1955. Menciinde estas, ke en 1954 la nombro de elsendoj estis 1,014, kio signifas kreskon de 160 programoj kompare al 1953, kaj 273 komp. al 1952.

**Someraj kursoj.** Ĉar en la lastaj jaroj plimultiĝis la someraj kursoj diversspecaj, mi enketis ĉe kelkaj aranĝintoj por ekscii pri iliaj spertoj kaj sugestoj. Kelkaj el ili opinias, ke estas nedezirinda tro forta konkurenco ĉe la publiko, kio respuguliĝas en la nombro de partoprenintoj. Statistikon pri tio ĉi mi ĝis nun ne sukcesis kompili.

**Konkursoj.** Pri la *Internacia Konkurso* raportas la ĝenerala sekretario. Pri la *Belartaj Konkursoj* raportis en la februara numero 1955 de "Esperanto" d-roj Szilagyi kaj Waringhien. La poezian branĉon partoprenis 23 poetoj kun 52 kontribuoj. Al la proza branĉo venis 26 konkursaĵoj. La limtago de la *Romankonkurso* ankoraŭ ne alvenis, sed mi proponas prokraston de tiu limtago, se ne estus sufiĉe multe da konkursaĵoj. La *Vortenigmoj*, kiuj regule aperas en nia revuo sub gvido de sindona s-ro Mooy, ĉiumonate kolektas proks. 60 konkursantojn. La *Librokonkurso*, presita en la junia numero de "Esperanto," evidente ne vekis grandan intereson, ĉar partoprenis nur 19 personoj. La *Festtaga Konkurso*, publikigita en la decembra numero 1954 de "Esperanto" allogis plurajn centojn da konkur-santoj.

## REVUO KAJ SERVA CENTRO (Hans Jakob)

**Revuo.** La revuo ampleksis en la jaro 1954 entute 340 paĝojn plus 44 paĝojn de kovrilo. Ĝis novembro plenumis la laboron de kunigo, rilatado kun la presisto, enpaĝigo k.t.p. la Centra Oficejo. Ek de decembro transprenis tiun laboron S-ro Reto Rossetti kiel Helpredaktoro.

**Biblioteko.** Kelkmiloj da objektoj estas zorge kunigitaj en kartonaj kestoj, atendantaj prilaboron. Nun aro da

bonvolaj samideanoj sin metis je dispono por rekopii la tutan sliparon de 15.000 kartoj. Post unu jaro ĝi estos preta, kaj tiam ni ankaŭ esperas akiri pli indan ejon por la biblioteko.

**Interhelpo.** Post la dua milito la petoj pri medikamentoj fariĝis regulaj, precipe el orientaj landoj. Dum la pasinta jaro ni registris 23 petojn plenumitajn de UEA. Aliajn petojn ni povis plenumi pere de Internacia Ruĝa Kruco.

**Turisma Servo.** Dum la jaro ni forsendis 52 kolektojn de turistbroŝuroj, speciale de noveldonitaj, por uzado en ekspozicioj.

**Eldono de Ŝlosiloj.** Aperis represo stereotipa de la germana ŝlosilo kaj devis aperi intertempe la norvega, pri kio ni korespondis kun Kapitano R. Bugge-Paulsen en Oslo.

## Centra Oficejo (Sekretario)

1. **Oficejo.** Ĝis la mezo de novembro 1954, la oficejo funkciis sub direkto de S-ro C. C. Goldsmith. Poste transprenis provizore la laborojn de Ĝenerala Sekretario S-ro J. C. Rapley. La oficejo pritraktas, interalie, plivigliĝantan libroservon kaj fortan enfluan de aliĝoj.

2. **Financoj.** Aparta raporto montras ke la jaro 1954 finiĝis sen defcito. Por certigi tion, oni transmetis el la kongresa saldo £126 15s. 4p., kompare kun £288 en 1953. La bilanco kaj spezoj estas reviziitaj je la laŭleĝe rekonita revizoro S-ro H. Milsom, kiu estas elektita de la Komitato.

Ni aparte deziras atentigi pri kreskoj kompare je la rilataj ciferoj por la antaŭa jaro de enspezoj en la rubrikoj MS — £150, MJ — £50, kaj Libroservo-profitado — £50. Aliflanke, la Jarlibro, precipe pro la teknika terminaro publikigita en la dua parto, kostis preskaŭ £100 pli ol en la antaŭa jaro.

3. **Membraro.** La nombro de membroj je la fino de 1954 estis 17,001 en 80 landoj, dividitaj laŭ la kategorioj: AM 10,898, MJ 1,075, MA 3,943, MS 741, Patronoj 7, DM 278, HM 59.

4. **Delegitoj.** La statistika nombro je la fino de 1954 estis 2,027 kompare kun 1938 je la fino de 1953. Ricevitaj

respondiloj pri la delegita servo dum 1954 donas ateston pri la viglo kaj utilo de la delegita reto ĝenerale.

5. **Jarlibro.** La unua parto de la Jarlibro 1954 aperis en januaro, kaj enhavis 288 paĝojn kun la kutimaj ĝeneralaj informoj pri la movado, kaj kun la listo de delegitoj. La dua parto aperis en oktobro, kaj enhavis 80 paĝojn, kun la ĝisdataj informoj pri la movado, la Estrara raporto de la pasinta jaro kaj krome, Matematikan Terminaron de D-ro C. M. Bean.

La Jarlibro 1955 presiĝis en la fruaj tagoj de februaro, sed poste suferis gravan prokraston en la lasta stadio pro teknikaj kaŭzoj ĉe la presejo. Rezulto estas, ke la individuaj ekzempleroj malrapide disendiĝis al la membraro je la fino de februaro kaj la unuaj du-tri tagoj de marto. La nuna eldono havas 310 paĝojn.

La instigo de la Prezidanto pri pli energia kolektado de anoncoj donas kiel rezulton, ke ni en ĉi tiu jaro povis aldoni ĉirkaŭ 20 paĝojn da anoncoj. Anoncoj plivalorigas la Jarlibron, kaj krome, kontribuas al la financoj de la asocio. Sekve, la Estraro rekomendas al ĉiuj individuaj membroj varbi anoncojn por la Jarlibro 1956.

6. **Libroservo.** Dum la vintraj monatoj tiu servo estis aparte vigla, interalie pro la eldoniĝo de *La Internacia Lingvo*. Tiu servo forrabis pli da tempo, ol montros la profito, ĉar la kurtaĝo por tiu menciita eldonaĵo (4p. por ĉiu ekzemplero) apenaŭ kovras la elspezojn de pakado k.t.p. Tial la profito montriĝos ĉe la Eldona Fondajo, anstataŭ ĉe la Libroservo.

7. **Internacia Konkurso.** Venkis Kanado en 1954 per atingo de 144%. Finlando preskaŭ atingis la saman procentaĵon sed devis kontentiĝi je dua vico. Tria estis Sudafriko, kun 131.7%.

8. **Kontakto kun la Membraro.** Plej vigla kontakto ekzistas kun membroj en Eŭropaj landoj, en Usono kaj Brazilo. La regulaj kontaktoj okazas kompreneble nur kun la plej aktivaj membroj en ĉiuj landoj, kvankam el orienteŭropaj landoj, kie ni posedas malmultajn membrojn, fontas relative granda proporcio de niaj korespondaĵoj. Precipe en tiuj, kaj en landoj kie la varbado kaj informado estas aparte malfacilaj, ni klopodas kuraĝigi kaj konsili per leteroj niajn membrojn; ankaŭ per ekspedo de unuopaj senpagaj numeroj de la revuo.

## Raporto pri la laboro de la Centro de Esploro kaj Dokumentado por la periodo inter 1/IV/1954 -28/II/1955

(D-ro I. Lapenna)

1. **Organizaj demandoj.** Ankaŭ ĉijare CED havis tute malgrandan oficejeton en Londono, dum la teknika multobligado de diversaj dokumentoj estis farata en la CO en Heronsgate. En la fino de la laborjaro CED havis 81 kunlaborantojn en 20 landoj. CED havas getradukantojn por la lingvoj: angla, franca, rusa, itala, germana, hispana, portugala kaj nederlanda.

2. **Plenumitaj laboroj.** CED realigis la diversajn taskojn laŭ la laborplano, aprobita de la Komitato en Haarlem. Jen la ĉefaj plenumitaj laboroj:

(a) Dokumenta materialo: ĝis la 28a de februaro estis kolektitaj kaj registritaj entute 534 dokumentoj pri Esperanto kaj pri la lingva problemo en la internaciaj rilatoj ĝenerale.

(b) Dokumentaro: Estas daŭrigata la publikado de dokumentoj laŭ la plano farita en la jaro 1952. La dokumentoj estas nuntempe sendataj al 164 organizaĵoj kaj institucioj en 67 landoj. Ilin ricevas ankaŭ ĉiuj UNESKO-komisionoj de diversaj landoj.

(c) Eldono de la Dokumento CED/4: Okaze de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo estas eldonita la dokumento CED/4 kun la titolo "La Internacia Lingvo kaj la Kontribuo de la Esperanto-Movado al la Celoj de UNESKO." La dokumento estas publikigita en la franca lingvo en 400 ekzempleroj, en la angla en 500 ekzempleroj, en la hispana en 5,000 ekz. presitaj sur luksa papero. Ĝi estis disdonita al ĉiuj delegitoj de la Konferenco kaj sendita al ĉiuj UNESKO-Komisionoj, ministerioj de edukado kaj pluraj sciencaj kaj kulturaj instancoj de la mondo. Tiu ĉi dokumento estis publikigita ankaŭ en la nederlanda lingvo kaj nun estas preparata eldono en la portugala.

(d) "La Internacia Lingvo—Faktoj pri Esperanto." Fine de la jaro 1954 aperis tiu libro kiel unua eldono de CED. La ĝisnunaj recenzoj de la verko estas tre bonaj. La libro disvendiĝas pli ol kontentige. Estas certe, ke tiu ĉi okumenta verko multe helpos la pluan disvastigon de

Esperanto. Nun la verko estas tradukata en la francan kaj espereble ĝi aperos en tiu ĉi lingvo jam en 1955. La eldonon prizorgas sinjoro A. Lienhardt el Mulhouse (Francujo).

(e) Unua Universala Ekspozicio de Esperanto : En plej harmonia kunlaboro inter CED kaj la Urugvaja Esperanto-Societo estis organizita en Montevideo la plej granda Esperanto-Ekspozicio en la historio de la Movado. Pri la Ekspozicio vidu artikolon en la feb. numero de "Esperanto," pp. 61-65. Ĉi tie estas akcentinde, ke la preparlaboroj por la Ekspozicio daŭris pli ol unu jaron, ke la planon de la Ekspozicio ellaboris CED, ke materialo estis sendita el ĉiuj partoj de la mondo de pli ol 200 institucioj kaj individuaj personoj kaj ke la teknikan aranĝon prizorgis speciala organiza komitato sub la prezido de Prof. Fernández-Menéndez. La Ekspozicio nun estas je dispono de la Informa Fakoj de UEA.

(f) Eŭropa Konsilantaro : La Centro liveris al sia kunlaboranto D-ro Herrman dokumentan materialon pri Esperanto, por ke li povu ĝin utiligi en la klopodoj ĉe la Eŭropa Konsilantaro. La pluaj klopodoj ĉe tiu instanco estas dependaj de la konsultaj aranĝoj, kiujn la Asocio devus peti por povi pli efike agi.

(g) Enketo pri la politika kaj kultura aspektoj de la Internacia Lingvo : La 6-an de marto 1954 estis sendita al ĉiuj landaj asocioj cirkulero pri tiu ĉi demando kaj donitaj detalaj konsiloj pro la maniero fari la enketon. Al la cirkulero estis aldonita speciala demandaro. La enketon tre bone plenumis la kunlaborantoj en Italujo, Nederlando, Jugoslavio, Francujo kaj Saarlando. La rezultoj de tiu enketo estis longe diskutataj en Haarlem. Surbaze de tio estas kunmetita la Memorando, kiun akceptis la Kongreso kaj kiu poste estis sendita al la Ĝenerala Direktoro de UNESKO kaj publikigita kiel dokumento 8C/PRG/C Add.

**3. Plenumataj laboroj.** La ĉefaj nun plenumataj laboroj estas :

(a) Bibliografio : La Bibliografio pri la Esperanto-publikaĵoj en 1953 kaj 1954 estas preskaŭ preta. La kunlaboranto de CED Sinjoro Auld promesis liveri la raporton tuj post Pasko. Estus tre utile presigi la Bibliografion, eventuale en la dua parto de la Jarlibro 1955.

(b) Esperanto en sciencaj gazetoj : Doktoro W. P. Roelofs plue esploras la aferon kaj kredeble la laboro estos finita en tiu ĉi jaro.

(c) Esperantaj libroj en publikaj Bibliotekoj : La kunlaboranto sinjoro Winkel plue okupiĝas pri la demando kaj kredeble la tasko estos plenumita en tiu ĉi jaro.

(d) Ekonomiaj malavantaĝoj de multlingveco : Baldaŭ CED entreprenos novan enketon, nome pri la ekonomiaj malavantaĝoj de multlingveco en internaciaj organizaĵoj. Tiu ĉi enketo mi mem entreprenos tuj kiam la tempo tion permesos.

Estas necese akcenti, ke en la pasinta laborjaro la aktiveco de CED estis ĉefe direktita al dokumentado de nia afero antaŭ UNESKO. Tiuj klopodoj, organike ligitaj al la klopodoj en la fakoj de eksteraj rilatoj kaj informado, en harmonia kunlaboro inter centoj da kunlaborantoj de CED, de la informaj fakoj kaj de la IGS, estis kronitaj per la decidoj de UNESKO en Montevideo.

### SCIENCA REVUO

preparos nian lokon en sciencaj medioj, kiam ĝi trovis sian lokon inter la Esperantistoj.

Klerigu vin kaj abonu.  
Scienculoj, aliĝu al ISAE.

Provezemplerojn de Scienca Revuo kontraŭ unu respondkuponon petu ĉe la eldonisto :

**J. MUUSSES,**  
**Purmerend, Nederlando.**

## ALDONO

### Raportoj de Landaj kaj Fakaj Asocioj

**Enkonduko.** En ĉi tiuj raportoj troviĝas interesa informo pri diversaj aranĝoj, kiujn la asocioj provis por progresigi la movadon. Kelkaj el tiuj aranĝoj kaj metodoj certe interesos ne nur la gvidantojn en la movado sed ankaŭ unuopajn samideanojn. Pro tio ili meritas atentan tralegadon. Menciinde estas ke, el ĉiuj, Saarlando havas la honoron sendi raporton unua. Pri la nunjara laboro, raportojn oni bonvolu sendi al la koncerna estrarano ĝis la fino de februaro, 1956.

### Aliĝintaj Asocioj

**1. Argentino.** Dum la pasinta jaro ni reorganizis la eldonon de nia bulteno "Argentina Esperantisto," kiu aperis ĉiun duan monaton.

Pere de nia informa fako ni sukcesis aperigi multajn artikolojn en tagjurnaloj kaj revuoj, kaj en pli ol 30 urboj la ĵurnaloj publikigis entute 450 senditajn informojn.

Sekve de la pli bona informado de la publiko, la informpetoj pri nia koresponda kurso estis multnombraj, kaj ni momente spertas malfacilaĵojn pro la elĉerpiĝo de la lernolibro de Szilagy, kies represo estas nun petita en Londono.

Okazis dek prelegoj en ses urboj, kaj disdoniĝis multaj flugfolioj, afiŝoj kaj broŝuroj. Dufoje dum la jaro okazis komentarioj per la radio. La tri plej fortaj grupoj organizis kursojn elementajn kaj perfektigajn. En Buenos Aires la asocio okazigis seminarian kurson. La 8a nacia kongreso, nun en preparado, okazos en la urbo Rosario.

**2. Aŭstria Esperantista Federacio.** Ĉe ni la plej grava evento de 1954 estis la okazigo de nia Jubilea Kongreso, sub protekto de la ŝtata prezidanto. Okaze de la kongreso eldoniĝis dua Esperanta poŝtmarko, efika varbilo por Aŭstrujo kaj Esperanto. Daŭris ankaŭ la eldonado de oficialaj bildpoŝtkartoj, kun tekstoj en Esperanto.

Ni nun preparas la eldonon de la dua volumo de "Aŭstria Antologio." La Societo de Aŭstria Instruistoj ricevis permeson aranĝi varbparoladojn antaŭ gepatroj-lernej-societoj. La sama societo aranĝis kurson en blindula instituto. Dum la jaro ni ricevis la subtenon de la ministerio de edukado, de la laborista ĉambro kaj de la sindikata ligo. Al nia Unesko-representanto ni sendis detalan raporton por la Unesko-konferenco en Montevideo.

**3. Brazila Esperanto-Ligo.** Speciale floras niaj korespondaj kursoj. En malgranda urbo Resplendor estas 130 tiaj lernantoj. Montriĝas ankaŭ granda intereso por la supera kaj profesora kursoj.

Kelkaj gazetoj aperigas konstantajn Esperanto-fakojn, kiujn redaktas lokaj Esperantistoj. B.E.L. disdonas regule komunikaĵojn al la ĉefaj ĵurnaloj pri gravaj Esperantaj faktoj. Okazis ankaŭ multaj radio-elsendoj.

En diversaj urboj ni havis elstarajn sukcesojn, nome, utiligo de Esperanto fare de urba registaro por turisma propagando, malavara subvencio al loka societo, sukcesa propagando per la kino, registro de disko kun kanto en Esperanto, starigo de ludantaro kiu ofte prezentas Esperantan teatraĵon, rekomendo en Pernambuco de la Ministro de Edukado kaj Kulturo al la instruistaro pri la lernado de Esperanto, kaj en alia urbo la starigo de Esperanto-Libro-vendejo.

Funkcias pluraj kursoj bone vizitataj. En unu el tiuj jam de kelka tempo oni premiis la unuajn lernantojn per ilia enskribo kiel membroj de U.E.A.

B.E.L. ricevas subvencion de la Federacia Registaro, konservas riĉan arkivon, aperigas regule sian oficialan gazeton, kaj lastatempe sendis materialon por la Unua Universala Ekspozicio de Esperanto en Montevideo.

Per la agado de fakuloj Esperanto estos utiligata en du gravaj internaciaj kongresoj, baldaŭ okazontaj en Rio de Janeiro, nome la 26a Eŭkarista Internacia Kongreso kaj la Internacia Kongreso de Statistiko.

Fine, por festi sian Jubileon en 1957 B.E.L. intencas eldoni ĝis tiam kelkajn verkojn el la brazila literaturo Esperanten tradukitajn.

**4. Britujo.** Ni festis nian Oran Jubileon per granda Artfesto, kiu tiel brile sukcesis, ke oni intencas denove okazigi tian feston, eble ĉiun duan jaron. La Artfesto malkaŝis talenton inter la brita Esperantistaro, kiu alie restus kaŝita.

La korespondaj kursoj el tri specoj, elementaj, superaj kaj tradukaj, daŭre funkciis dum la jaro.

Dum la nacia kongreso en Manchester okazis tre interesa evento. Unu el la Esperanto-instruistoj en Denton duagrada lernejo, kie dum jaroj oni instruas Esperanton, montris kelkajn modernajn instrumentojn uzitajn en tiu lernejo dum la instruado de Esperanto. Por tiu celo li utiligis 20 geknabojn el la lernejo.

La gazetara servo daŭre funkcias. Krome, de tempo al tempo la sekretario diskonigas ĝisdatan novaĵon pri la movado al la lokaj grupoj. Oni ankaŭ eldonis belajn Esperanto-afiŝojn por montri sur muroj de grandaj stacidomoj.

La brita reprezentanto al Unesko, S-ro E. D. Durrant, dum la jaro bone konservis la utilajn kontaktojn kun la brita uneska delegacio.

Je la momento okazas en Skotlando interesa edukada eksperimento pri la valoro de Esperanto-lernado kiel antaŭpreparo por la lernado de la franca lingvo.

El la nuna membraro de B.E.A. 57% estas individuaj membroj de U.E.A., kio montras la fortan subtenon de B.E.A. al la internacia asocio.

**5. Danujo.** C.D.E.L. konsistas el 32 kluboj kun 1179 membroj, el kiuj 159 estas individuaj membroj de U.E.A.

Dum 1954 nia oficiala revuo "Dansk Esperanto-Blad" aperis en 12 numeroj, spite altiĝon de la pres-kostoj.

Ni konservis niajn kontaktojn kun la Dana Unesko-komisiono, kaj ankaŭ kun la Dana reprezentanto en la Kultura Komisiono de la Eŭropa Konsilantaro.

Dum la pasinta jaro nia gazetara servo dissendis 7 artikolojn pri nia movado kiujn oni grandskale uzis.

Prelegvojaĝojn al niaj kluboj faris la prezidanto de C.D.E.L., oferante por tiu celo parton de sia ferio. Ni nun preparas migrantan Esperanto-ekspozicion, por posta utiligo en la grupaj kaj aliaj kunvenoj. Nia koresponda kurso funkcias kun 20 lernantoj. Ni ankaŭ preparas kurson por tagjurnalo.

La filmstria servo komencis sian agadon kun kvar film-strioj, pruntedonante ilin laŭvice al la diversaj kluboj. Por la sama celo ni nun kolektas kliŝojn.

Ni jam komencis preparojn por la Universala Kongreso, kiu okazos en Kopenhago en 1956.

**6. Flandra Ligo Esperantista.** Dum la jaro efektiviĝis la komuna eldono de la naciaj gazetoj por kvar landaj asocioj, nome L.E.E.N., R.B.L.E., S.E.S., kaj F.L.E. Pro tio ni devis ŝanĝi la formaton de nia propra revuo "Flandra Esperantisto," kiu aperis 11 fojojn kun eldonkvanto de 500.

La membraro por la jaro 1954 kompare kun 1953 restis sensanĝa, precipe pro manko de kursoj, kiuj okazis en nur tri urboj. Tamen dum la tuta jaro funkciis nia koresponda kurso.

Kiel kutime okazis je Pentekosto komuna kongreso en

kunlaboro kun L.E.E.N. kaj R.B.L.E. En Antverpeno okazis antaŭkongreso de la Universala Kongreso.

Interkonsente kun L.E.E.N. ni aranĝis ke niaj liganaj havu la eblecon legi la librojn en la biblioteko de L.E.E.N., kondiĉe ke tiuj pagu la afrankon por resendo.

Okaze de nia jubilea jaro ni forsendis al ĉiu membro de F.L.E. paketon, kiu enhavis propagandilojn, broŝuretojn kaj diversajn gazetojn.

**7. Francujo.** La pliboniĝanta organizo de U.E.F. instigis multajn eksmembrojn realiĝi kaj novajn aliĝi al nia Asocio. La nombro de asociaj membroj de U.E.A. estas 1064.

Lastatempe ni dungis konstantan sekretariinon, kiu estas helpata de pluraj samideanoj, kiuj daŭre disponigas sian liberan tempon al U.E.F.

Ni daŭrigis nian agadon en parlamentaj medioj, kie estas malfacile ricevi sukcesojn. Tamen ni sukcesis akiri la simpation de la Prezidanto de la Senata Komisiono por Nacia Edukado, kaj ankaŭ de la deputito de Jura, kiu jam en 1953 esprimis sian favoron al Esperanto. Ni ankaŭ provas, per helpo de Ministro, okazigi kelkajn eksperimentojn pri franca-esperanta dulingvismo.

Nia Gazetara Servo monata estas ĵus organizita laŭ nova metodo, kaj pri kontentigaj rezultoj ni havas esperon.

Nia oficiala gazeto "Franca Esperantisto" nun aperas ĉiumonate kun 12 paĝoj. La abonantaro nun estas 750.

Inter la plej sukcesaj metodoj por propagando ni trovis la prelegojn kun lumbildoj kaj filmojn. Dum la jaro nia Libro-Servo disvendis 522,000 fr. da libroj kaj broŝuroj. En preparo estas nova esperanta-franca vortaro. Pluraj novaj lernolibroj aperis, el kiuj du estas aĉeteblaj en ordin-araj librovendejoj. Nia koresponda kurso ankaŭ bone sukcesas.

**8. Hispana Esperanto-Federacio.** Dum la jaro nia progreso estis malrapida sed firma. Bedaŭrinde ĉe ni la homoj ne multe deziras klopodi por idealajoj. Tamen dum la jaro ni atingis pli favoran ĝeneralan atmosferon, kaj pro tio, la oficialigon de kelkaj lokaj grupoj.

Nia gazetara kaj radia servoj celas propagandi ĉe eksteraj medioj, pere de tiuj nuntempaj masivaj iloj. Nia informa kaj kunordiga servo celas starigi reton de Esperantistaj delegitoj por aglutini la ĉi-tiean movadon.

Por disvastigi la lingvon ni uzas du sistemojn, nome, grupkursojn kaj korespondajn kursojn, ĉefe por izoluloj.

**9. Italujo.** Ni ĝojas raporti daŭran kreskadon de nia membraro. La grupoj nombras entute 32. El niaj membroj 213 estas individuaj membroj de U.E.A.

Por la Fondaĵo Montevideo ni kolektis 86,460 lirojn. Cetere kun la celo informi la italajn komisionanojn ĉe Unesko, nia Inform-Oficejo kolektis abundan materialon kiu aperis en multobligita vesto, 38-paĝa. La Inform-Oficejo nun havas kunlaborantojn en 33 urboj, kaj entute vigle kaj bone funkcias. Ni eldonis monatan sespaĝan informilon, kun freŝdata novaĵo pri la internacia movado. Nia gazetara servo ankaŭ viglas, sendinte dum dek monatoj 581 artikolojn al 165 gazetoj.

La radio daŭre interesiĝas pri nia movado, kaj almenaŭ dufoje en televidaj programoj ni trovis lokon.

Nia Esperanto-Instituto celas precipe trafi la lernejan kaj studentan mediojn, en kiuj ni jam akiris konsiderindajn sukcesojn.

La esperantista esploristo, Tibor Sekelj, venis en Italujon, kaj nia federacio organizis por li kunvenojn en 12 urboj.

Ni prizorgis la disvastigon de la filmo "Aŭstralio hodiaŭ" en publikaj kaj privataj lernejoj, kaj ankaŭ en lokaj grupoj. Ĝis la jarfino la filmo estas aperinta en 21 Italaj urboj.

**10. Jugoslavio.** Jugoslavia Esperanto-Federacio konsistas el ses aliĝintaj ligoj kun kvar lingvoj. Dum la jaro J.E.L., pere de la ligoj, entreprenis la kolektadon de subskriboj por la enkonduko de Esperanto en la lernejojn, sukcesis starigi kontakton kun la nacia Unesko-Komisiono, enkondukis lektoraton por Esperanto ĉe la Ekonomia fakultato en Zagreb, aperigis regule la oficialan gazeton "La Suda Stelo" en eldona kvanto de 1200 ekzempleroj, kaj, pere de Marinko Gjivoje, prizorgis la eldonon de Biografio de la Internacia Lingvo en Jugoslavio.

Dank' al nia Informa Servo preskaŭ ĉiusemajne aperis en niaj gazetoj gravaj artikoloj pri Esperanto. La samideanoj en Zagreb donis 90 elsendojn perradiajn en Esperanto en la daŭro de unu jaro kaj duono, kaj sekve de tio ricevis 400 leterojn el 20 landoj. Ni ankaŭ subtenis la grandan japanan eksperimenton "Infanoj de la Mondo."

La 16a Kongreso de la jugoslavaj Esperantistoj okazos en Sarajevo en la komenco de julio 1955. Al ĝi ni intencas inviti kiel gastojn reprezentantojn el la najbaraj landoj, Grekujo, Turkujo kaj Izraelo, eble ankaŭ el Bulgarujo kaj Hungarujo.

**11. Kroatujo.** K.E.L. progresis dum la jaro kaj enhavas nun 15 grupojn, al kiuj de tempo al tempo ni

donas gvidliniojn por la laboro. Krome ekzistas 10 grupoj ankoraŭ nealiĝintaj.

Por propono enkonduki Esperanton en niajn lernejojn ni kolektis 30.000 subskribojn. Samtempe ni sendis informon pri nia movado al ĉirkaŭ 150 universitataj profesoroj kaj aliaj altranguloj en nia lando. Venis respondoj de multaj, preskaŭ ĉiuj favoraj.

Ni ĵus eldonis la poemojn de promesplena juna kroata poeto, Boro Pavlović, kaj ankaŭ dupaĝan propagandilon en 10.000 ekzempleroj. Nia Esperanto-Servo prizorgis la eldonon de gramatikoj, vortaroj kaj ŝlosiloj. La gramatiko de D-ro Maruzzi eldoniĝis en 10.000 ekzempleroj.

Kun C.E.D. ni kunlaboradas, kompilinte bibliografion de Esperantaj eldonaĵoj en Jugoslavio, kaj sendinte materialon al la Ekspozicio en Montevideo.

Dum la jaro okazis 46 kursoj, ankaŭ 31 prelegoj en niaj ŝtataj lernejoj. Aparte menciinda estas kurso en la gimnazio en Bjelovar, kiun gvidis unu el la lernantinoj.

Ni partoprenis sukcesan ekspozicion de infan-desegnoj en nia lando, ankaŭ sendis materialon al similaj ekspozicioj en Svedlando kaj Italujo. Al Japanujo ni sendis materialon por la grava eksperimento "Infanoj de la Mondo."

En la ekonomia fakultato en Zagreb estis starigita katedro por Esperanto, sub gvido de D-ro Borovečki.

**12. Maroka Esperanto-Asocio.** Kongreso de M.E.A. vizitita de 70 samideanoj, okazis en Rabat en majo. Tie ni preparis nian programon kunigi Esperantistojn en tuta Maroko, kaj starigi kiel eble plej multajn grupojn.

Post propagando pere de artikoloj en gazetoj ni sukcesis progresigi la movadon, kaj jam nun starigis programon por la lernado de Esperanto per sama metodo en nia tuta lando. La ĉefaj urboj malfermis kursojn diversgradajn en novembro, kun pli ol cent partoprenantoj. Je la fino de la nuna lernperiodo okazos konkurso por la lernantoj, kaj poste oni donos premiojn al la sukcesintoj.

Interurbaj renkontiĝoj ankaŭ okazas, kaj tiamaniere plifirmiĝas la bazo de la movado en Maroko.

**13. Nederlando.** La jaro 1954 estas historia jaro en la nederlanda movado, pro la okazinta 39a Universala Kongreso en Haarlem. Tiu grava manifestacio, certe ankaŭ dank' al la ĉeesto de la nederlanda ministro-prezidanto, D-ro W. Drees, kompreneble influis la publikigaĵojn pri Esperanto en ĵurnaloj, radio-stacioj kaj kinejoj. Estas tutcerte ke la nederlanda popolo tiel estas dum kelkaj

monatoj regule informita pri nia movado. Kiel kutime la fruktoj de tiu propagando ne estas tuj senteblaj; la membro-nombro ne grave ŝanĝiĝis. Ni esperu tamen por la estonteco.

Denove en pluraj popol-universitatoj okazis Esperanto-kursoj, same en kelkaj instruistaj seminarioj.

Okaze de la Haarlem'a Universala Kongreso eldoniĝis diversaj faldfolioj; la urbo Haarlem eldonis belaspektan libreton.

La kunlaborado kun la Flandra Ligo daŭris sur la tereno de la komuna gazeto, en kiu parte ankaŭ partoprenas la Belga Ligo.

La Oficejo, Esperanto ĉe la Instruado, en kiu kunlaboras ĉiuj nederlandaj Esperanto-organizaĵoj kaj preskaŭ ĉiuj instruistaj asocioj, regule eldonas sian nederlandlingvan propagandan gazeton (4 foje en la jaro—eldonnombro 3000 ekz.). Oni sendas ĝin regule al ĉiuj parlamentanoj kaj aliaj oficialuloj.

Denove la membraro de U.E.A. en 1954 kreskis, dank' al la U.K. kaj la laboro de la ĉefdelegito.

**14. Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko.** En 1955 E.A.N.A. festos sian Oran Jubileon. Dum la pasinta jaro estas dissenditaj 1600 leteroj al informpetantoj, kun propono sendi al ili novan fonograf-diskon, provizore senpagan. Se ili ne resendos ĝin post 10 tagoj tio signifus ke ili volas reteni la diskon. En tiu kazo E.A.N.A. sendas al ili fakturon kune kun membrokarto, gazeto ktp. Sur la disko troviĝas konversacio en Esperanto kun traduko en la angla lingvo. Tio donas al multaj interesatoj okazon aŭdi Esperanton kaj konvinkiĝi pri ĝia utilo.

Ni ankaŭ eldonis 10.000 kopiojn de la propagandilo "Tune in to the World" (Enaŭskultu la mondon), kiu estas ŝatata kaj efika broŝuro.

Dum la jaro okazis konsiderinda kresko en la nombro de aliĝintaj junuloj, precipe studentoj kaj soldatoj, bona aŭguro por la estonteco.

En almenaŭ 50 ĵurnaloj kaj gazetoj niaj membroj aperigis "leterojn al la redaktoro," speciala rubriko en anglalingvaj gazetoj, kun klarigoj pri la pretendoj kaj utilo de la internacia lingvo. Novaj kursoj komenciĝis en 26 lokoj, inkluzive lernejojn, blindulernejojn kaj kolegiojn. Ekspozicioj estis aranĝitaj en 8 lokoj, dum deko da televidaj programoj prezentis mallongan klarigon pri Esperanto.

La 44a Kongreso de E.A.N.A. okazinta en Nov-Jorko, bone sukcesis. Inter la temoj pritraktitaj troviĝis Esper-

anto kaj Unesko, propagando, kursoj kaj instru-metodoj kaj materialo.

**15. Norvegujo.** Je la fino de 1954 N.E.L. havis 29 lokajn grupojn kaj sume 849 membrojn. Ni aranĝis denove konkurson inter la grupoj laŭ modelo de la internacia konkurso de U.E.A.

Okazis en la lando 36 kursoj kun 266 partoprenantoj. En la grupoj laboris 24 studrondoj kun 190 membroj. La leterkurso havis 104 novajn lernantojn. La nova gazeta kurso aperis en kvin gazetoj. 27 personoj plenumis elementan kaj 6 superan ekzamenon.

La Gazetara Servo dissendis 27 artikolojn kun novaĵoj pri Esperanto al ĉiuj norvegaj gazetoj, kaj registris 1143 aperojn en 142 gazetoj. La tria eldono de la propaganda broŝuro "Esperanto, la internacia lingvo" estis presata en dek mil ekzempleroj. Dum prelegvojaĝo en Svedujo docento S. Pragano vizitis du urbojn ankaŭ en Norvegujo (Oslo kaj Trondhejmo) kaj faris tie prelegojn.

Parlamentano Carl Henry prezentis proponon pri U.E.A. kiel kandidato por la Nobel-premio pri paco, sed la Nobel-komitato decidis ne doni premion por 1954.

La Departemento pri Eklezio kaj Instruado ĝis nun ĉiam respondis al proponoj pri instruado de Esperanto en la lernejoj, ke la leĝoj ne permesas tion. Aŭtune 1954 la Parlamento ŝanĝis la leĝon pri popollernejoj tiel, ke ĝi nun permesas starigon de provklasoj pri novaj fakoj, kio malfermas la eblecon pri provklasoj ankaŭ de Esperanto.

Laŭ iniciato de N.E.L. okazis en la kadro de la kursoj de S-ro L. Friis en Helsingfør, Danujo, konferenco por Esperanto-gvidantoj, sub gvidado de J. H. Rosbacl kaj C. Støp-Bowitz, kaj ampleksa raporto pri tiu konferenco estas sendita, i.a. al ĉiuj landaj asocioj kaj la komitatoj de U.E.A.

**16. Serbia Esperantista Ligo.** En la pasinta jaro S.E.L. atingis multajn rimarkindajn sukcesojn. Intereso por Esperanto pligrandiĝis pro publikaj prelegoj, gazet-artikoloj kaj dissendo de Esperanta Kurso en Radio Beograd.

Dua eldono de nia lernolibro estas elĉerpita kaj nun ni preparas trian eldonon. Aperis dua eldono de ampleksa Esperanta-serbokroata vortaro.

S.E.L. daŭrigis la propagandon por la enkonduko de Esperanto en niajn lernejojn, kaj tiucele kolektis subskribojn.

"La Progreso," gazeto eldonata de la Beograda Esperanto-Societo, aperis regule ĉiumonate. Esperanto-semajno,

organizita de la beogradaj samideanoj en decembro, bone sukcesis. Dum ĝi, leteroj kaj poŝtkartoj estas stampitaj per propaganda stampilo, kun la vortoj, nacilingve, "Lernu la internacian lingvon Esperanto." En Zemun, en la lernejo por blinduloj, Esperanto estas deviga temo.

**17. Svedujo.** Dum la jaro ni sukcesis monkkolekti por Montevideo proksimume 4.000 svedajn kronojn. Okaze de la nomita konferenco ni ankaŭ pretigis la necesan materialon por informi la aŭtoritatojn en nia lando, kaj la necesajn informojn, kiujn bezonis D-ro Lapenna.

Somere, Sveda Esperanto-Instituto aranĝis prelegsemajnon en Frostavallen. Dum la aŭtuno ni organizis prelegvojaĝon por docento Pragano, rondiron kiu tuŝis ankaŭ Danujon kaj Norvegujon.

La septembra numero de nia gazeto estis eldonita kiel informa numero, kaj disvastigita en sufiĉe granda kvanto. Nova kvanto de la broŝuro "Bonvenon" estas presita dum la jaro.

En kunlaboro kun la norvega kaj dana federacioj ni decidis aranĝi interŝanĝon de la tempo por niaj jarkunvenoj, por doni eblecon al la najbaraj landoj viziti la jarkunvenojn de la aliaj nordaj landoj.

Dank' al donaco S.E.F. havis eblecon doni stipendiojn al du junuloj por ĉeesti la U.K. en Haarlem.

Okazis tutlanda enketo pri Esperanta literaturo en urbaj bibliotekoj. Ekspozicio de infandesegnaĵoj en Karlskoga, kompilita pere de Esperanto, altiris grandan atenton en la gazetaro.

La urba konsilantaro en Gotenburgo decidis doni al placo en tiu urbo la nomon Esperanto-placo.

**18. Svislando.** En nia lando troviĝas 12 grupoj, kaj el nia membraro 53% estas individuaj membroj de U.E.A.

Por kuraĝigi niajn junajn Esperantistojn nia Libro-Servo donas al ili rabaton je la libraj prezoj, kaj S.E.S. je la kotizoj. En junio okazis Junulara Tago en Neuchâtel, kun sukcesa programo parola, desegna, pentra, muzika, historia kaj instrua.

Por disvastigi informon pri la internacia lingvo ni aperigis artikolojn por revuoj instruistaj, kaj ankaŭ partoprenis en la grandskala movado "Infanoj de la Mondo" iniciatita en Japanujo.

Nia dumonata revuo "Svisa Espero" nun aperas en nova formo, kaj ni presigas ĝin en kunlaboro kun la belga, flandra kaj nederlanda asocioj.

La Informa Servo kontentige funkcias, sendante komunikojn pri Esperanto al pli ol 260 svisaj gazetoj. Per aranĝo kun Itala Esperanto-Federacio ni sendas informojn al tiĉinaj gazetoj kaj al la svisaj ĵurnalistoj en Romo.

La Svisa Esperanto-Instituto ekzistas de post la komenco de novembro, 1954, kaj funkcias kiel informejo kaj perkoresponda instrua centro.

Tute regule, kvar fojojn en ĉiu semajno, Esperanto estas aŭdebla sur du svisaj radio-ondoj. Por la enhavo de la programoj respondecas D-ro Baur kaj D-ro Privat.

En kelkaj lokoj dum la jaro prezentigis la rimarkinda Esperanto-filmo "Aŭstralio hodiaŭ."

## Ne-aligintaj Landaj Asocioj

**1. Bosnio kaj Hercegovino\*.** De la fondiĝo de nia Ligo ne okazis tiel sukcesa laboro kiel dum la pasinta jaro. Multajn kursojn ni organizis, ĉiujn bone vizitatajn. Inter ili estis kursoj por gimnazianoj, por instruistoj, por fervojistoj kaj aliaj plenkreskuloj.

Ni diskonigis informon pere de montrofenestroj, kaj Esperanto-ekspozicioj en diversaj urboj. Praktika ekzemplo de propagando estis aranĝo kun francaj samideanoj, per kiu okazis interŝanĝo de gemetlernantoj el Mostar, kiuj pasigis du semajnojn en Francujo dum sama nombro de francaj geknaboj pasigis samdaŭran tempon en Mostar. Cetere, okazis prelegoj en diversaj lokoj, sekve de kio oni enkondukis Esperanton en du klasojn de porinstruista lernejo.

Ni ankaŭ iomete trapenetris en la radion. En tiu direkto ni antaŭvidas pli da progreso.

Lastatempa vizito de la mondvojaĝisto, Tibor Sekelj, multe kuraĝigis la grupon en Sarjevo. Sekvis ankaŭ aliaj kontentigaj rezultoj. En Sarajevo oni nun intencas okazigi nian 16an nacian kongreson.

**2. Germana Esperanto-Asocio\*.** Je la fino de 1954 G.E.A. konsistis el 9 landaj ligoj kaj 125 lokaj grupoj kun 3128 membroj.

"Germana Esperanto-Revuo," la oficiala organo de G.E.A. aperis ĉiumonate kun 12-16 paĝoj.

En la Germana Esperanto-Junularo la membraro konstante kreskas. Tiu sekcio ricevas diversspecajn subvenciojn, kaj daŭrigas kaj ampleksigas la kontakton kun orientzonaj geamikoj.



Germana Esperanto-Instituto, kiu ricevas subvencion de la magistrata sekcio por instruaj aferoj de la urbo Munkeno, okazigis sep ekzamenojn de kandidatoj en diversaj kategorioj.

Inter la elstaraj aranĝoj dum la jaro estis la jenaj: la 32a nacia kongreso, kun interzona renkontiĝo de la Germana Esperanto-Junularo, la oraj jubileoj de la grupoj en Hamburgo, Karlsruhe, Frankfurto kaj Munkeno, trilanda renkontiĝo inter belgoj, germanoj kaj nederlandanoj, kaj fine, franca-germana renkontiĝo en Mannheim.

Por la Fondaĵo Eŭropa Kampanjo kolektiĝis ĝis nun 2075 gmk. Komenciĝis ankaŭ varbado en la Eŭropa Movado per komunaj lokaj renkontiĝoj por diskuti pri la lingva problemo en Eŭropo.

Nia gazetara servo eldonis 17 informilojn dum la jaro. Sekvis entute 867 publikigoj, ĉefe aŭ parte pri nia movado, kaj inter tiuj estis nur kvin kiuj malfavoris Esperanton, resp. komunan helplingvon. Ses radio-stacioj dissendis 15 intervjuojn aŭ informojn pri Esperanto kaj Esperantistaj aranĝoj.

**3. Kubo.** Dum la jaro 1954 la movado en Kubo vigle manifestiĝis en tri urboj, nome, Habano, Sagua la Grande kaj Santiago de Cuba. La kursoj en la du laste nomitaj urboj estis sukcesplenaj, kaj speciale signifaj pro tio, ke la plimulto el la lernantoj konsistis el infanoj kaj junuloj.

La ĝenerala propaganda laboro senlace daŭras, sed estas rimarkinda la tendenco turni sin al la fakaj laboroj, inkluzive filatelan, rotarian kaj knabskoltan.

**4. Pollando\*.** Dum la jaro 1954 ni konstatis atentindan plivigliĝon de nia agado ĉe diversaj aŭtoritatoj, precipe partiaj. Okaze de la Uneska konferenco ni trifoje sendis artikolojn al ĉirkaŭ 80 gazetoj kaj organizaĵoj. Bedaŭrinde en la pasinta jaro ni preskaŭ ne sukcesis aperigi pagitajn anoncojn en la tagjurnaloj kaj gazetoj.

Dum la jaro ni eldonis ciklostile "Bultenon," kiu enhavis plejparte informojn represitajn el esperantaj gazetoj.

Ni okazigis Zamenhofan solenajon ĉe la tombo, kaj informis pri tio la vastan publikon. Sed provoj disaŭdigii ion pri la kreinto de Esperanto per radio malsukcesis. La asocia delegitaro partoprenis ankaŭ la enterigon de la bedaŭrata S-ino Wanda Zamenhof.

Nia koresponda kurso daŭre funkcias, sed sub gravaj malhelpoj.

Por helpi al la fondaĵo Montevideo ni sendis plurajn

anglalingvajn librojn, poste venditajn, kaj la mono transdonita al la fondaĵo.

La tuta administra kaj organiza laboro, sufiĉe granda, kuŝas sur la ŝultroj de unuopaj samideanoj, kiuj tre sindone kaj fervore prizorgas la movadon en Pollando. Ni eniras la novan jaron kun optimismo kaj kredo al nia afero.

**5. Saarlando.** Lastan jaron ni daŭrigis la informadon de la ministroj de nia lando kaj de la membroj de la Eŭropa Konsilantaro rilate al la franca-angla bilingvismo, por atentigi ilin pri Esperanto kiel solvo de la lingvaj malfacilaĵoj. Je la momento oni oficiale antaŭenpuŝas la instruon de la franca lingvo.

En kelkaj rilatoj niaj provoj sukcesis. La trafikunuigo de Saarbrücken eldonis kvarpaĝan prospekton en Esperanto pri la urbo Saarbrücken. En la gazetoj regule aperas informoj pri nia movado. Nia radiostacio dum la jaro faris raportojn pri Esperanto kaj pri niaj specialaj aranĝoj. En la popollernejoj de Saarbrücken kaj St. Ingbert troviĝas Esperanto en la programo. Antaŭ la Medicina Societo de Saarbrücken okazis du paroladoj pri nia lingvo. Nia ĉefa bezono estas pligrandiĝo en la nombro de la laborpretaj gesamideanoj.

**6. Urugvajo.** La Esperanto movado ĉi tie, kvankam ĝis nun malforta, povas influi je la oficialaj sferoj, gazetaro kaj radio. Ĉe ni estas grava manko de kurs-gvidantoj.

Dum la jaro la ĉefaj aktivecoj centriĝis en Montevideo okaze de la organizo de la Unua Universala Esperanto-Ekspozicio, kiu brile sukcesis, dank' al energia kaj entuziasma aro de samideanoj sub la gvidado de profesoro Fernández-Menéndez.

Perkoresponda kurso regule funkcias. La Gazetara Servo aperigis centon da informoj kaj artikoloj pri la Esperanta movado. Kvar radiostacioj disaŭdigis sciigon pri Esperanto.

Nia vojaĝanta propagandisto, D-ro Heiman, vekis grandan atenton per efikaj prelegoj ĉe radiostacioj, rotariaj kluboj kaj liceoj. En du urboj okazis kursoj kun ĉirkaŭ cent enskriboj.

Nia oficiala gazeto, okpaĝa kaj multobligita aperis regule dum la jaro. La lasta aperinta numero estis dediĉita al la temo "Esperanto antaŭ Unesko."

Ni esperas ka la lastatempaj eventoj en Montevideo donos instigon al renovigo kaj aktivigo de la urugvajaj Esperantistoj.

•Intertempe Aliĝis al U.E.A.

## Fakaj Asocioj

**1. Internacia Asocio de Poŝtmark-Kolektantoj.** La I.A.P.K. havas nun membraro el 200, kun jarkotizo unu usona dolaro.

Nia oficiala organo "Internacia Poŝtmarka Revuo" estas eldonita en multobligita formo okfoje dum 1954. Ĉiun fojon la eldonkvanto estis 250 ekzempleroj.

Faka kunsido okazis dum la Kongreso en Haarlem, kiam oni diskutis la agadon de I.A.P.K. kaj ankaŭ nian revuon. La diskuto montris ke nia membraro deziras ke I.A.P.K. daŭrigu sian ĝisnunan agadon, kaj ke la revuo aperu kiel ĝis nun.

Dum la jaro la membroj estis tre aktivaj kaj utiligis grandskale la filatelajn servojn de la Asocio. Bedaŭrinde, en pluraj landoj ankoraŭ mankus helpantoj kaj perantoj por niaj filatelaj servoj.

**2. Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.** Dum la tuta jaro venas multaj korespondaĵoj al la centra informejo, nun en Birmingham, Anglujo, petante informojn, konsilojn pri instrumentoj, lernolibroj, k.t.p.

La koresponda centro daŭre funkcias, sed ne estas multe uzata.

Ni klopodas subteni la japanan projekton, "Infanoj de la Mondo," per ĝenerala kaj individua instigado kaj propagando.

La gazeto de la francaj Esperantistaj edukistoj "Esperanto et Culture" dufoje dum la jaro publikigas sekcion pri I.L.E.I. kun novaĵoj kaj aktualaj pedagogiaj spertoj. La bulteno de la Societo de Britaj Esperantistaj Instruistoj trifoje jare havas internacian sekcion, kiu ankaŭ servas al la reprezentantoj de I.L.E.I.

Ni ricevas bultenojn informajn de la Mondfederacio de la Instruista Profesio, kaj sendas informojn al tiu Konfederacio.

De Unesko ni ricevis altvaloran materialon por helpi nin pri nia 1955-a Kongres-temo "Internacia Eduko kaj ĝia Pacema Rolo."

**3. Internacia Scienca Asocio Esperantista.** La membraro de I.S.A.E. estas 318 el dek ses landoj. En 16 landoj ni havas delegitojn kaj en 2 reprezentantojn. Tri landaj sciencaj asocioj, nome la Brita, Franca kaj Nederlanda, kolektive aliĝis.

Dum la kongreso en Haarlem okazis kunveno de niaj membroj, kiam ĉeestis pli ol tridek.

Nia oficiala gazeto "Scienca Revuo" aperis per 2 numeroj de vol. 5, kaj per 3 numeroj de vol. 6, kun la kutima interesa kaj valora enhavo. En lastatempaj numeroj ni sukcesis aperigi prelegojn jam faritajn dum la Kongresa I.S.U.

Kelkaj membroj niaj, en kunlaborado pretigis manuskripton de Scienca kaj Teknika Vortaro, kiu aperos kiam ni jam ricevis sufiĉe de antaŭmendoj.

**4. Kristana Esperantista Ligo Internacia.** K.E.L.I. nun havas sekciojn en ok landoj kaj reprezentantojn en naŭ. La movado progresas inter Kristanaj Esperantistoj, en iuj landoj pli rapide ol en aliaj.

Dum la jaro ni okazigis diversajn aranĝojn per niaj membroj kaj amikoj kaj disvastigis nian fidon. Inter tiuj aranĝoj estis la antaŭkongresa konferenco en Oosterbeck kaj la dumkongresa granda Diservo en Haarlem.

Nia organo "Dia Regno," bele presita kun interesa kaj diversspeca enhavo, aperis sep fojojn dum la sezono.

Al Montevideo por la Unua Monda Esperanto-Ekspozicio ni sendis gravan kvanton de Kristan-Esperanta literaturo. Ni ankaŭ, kvankam ĝis nun sen sukceso, klopodis interesigi enlandajn sekciojn de la mondasocio por gejunuloj, Y.M.C.A. (Junulara Kristana Asocio).

En Nederlando radio N.C.R.V. dissendis ĉiumonate kvaronhoran prelegon en la rubriko "La Evangelio en Esperanto."

**5. Kvakera Esperantista Societo.** Dum la pasinta jaro K.E.S. estis sen elektita sekretario, kaj Guy B. Tordoff agis provizore laŭeble ĝis oni povas trovi personon, kiu volas preni la oficon. Okazis nur rutina korespondado kun aliaj landoj.

**6. Skolta Esperantista Ligo.** S.E.L. havas 18 agentojn en 17 landoj. Nur en tri landoj, nome Danlando, Belgujo kaj Britujo ekzistas organizita nacia sekcio, kaj en ĉi tiuj landoj oni aperigas periodajn bultenojn. En aliaj landoj niaj agentoj faras propagandon por Esperanto en la skoltmedioj.

La oficiala organo de la Ligo estas "La Skolta Mondo," kun eldono de 1,100 ekzempleroj. Ĝi aperas periode kun enhavo tre interesa por skoltoj. En la nuna tempo grava malhelpo estas la ofta ŝanĝiĝo en la membraro, kiu metas antaŭ la gvidantoj problemon ne facile solveblan.

**7. Universala Ligo.** En la fino de 1954 la Universala Ligo havis 10771 membrojn. La estraro decidis enkonduki novan kategorion de membroj, nome aktivaj membroj sen gazeto. La kotizo de tiuj membroj estas kvar steloj jare.

Dum la jarkunveno en Haarlem okazis la laŭstatutaj elektoj de du estraranoj. Reelektata estis D-ro Privat, kaj elektita la nova membro S-ro H. J. Henriksen.

La Ligo eldonis en 1954 sian kvaran Almanakon, kiun ricevis ĉiuj Aktivaj Membroj.

La sesa Internacia Kongreso de la Mondmovado por Mondfederalista Registaro okazis de 30 aŭg. ĝis 3 sept. 1954 en Londono. Rerezentantoj de U.L., estis D-ro Lapenna kaj S-ino J. Isbrücker. Rezolucio, proponita de U.L., en kiu ĉi tiu kongreso esprimis sian plenan apogon al la de U.E.A. proponita rezolucio, voĉdonota de la Unesko-Kunveno en Montevideo, estis unuanime akceptata.

S-ro A. C. Blatt, loĝanta en Tokio, Japanujo, reprezentis U.L. en la Dua Azia Kongreso por Mondfederacio en Tokio.

Pluraj anoj de U.L. faris paroladojn pri mondfederalismo en diversaj unuiĝoj.

Dum la jaro 1954 la gazeto de U.L., "La Praktiko" estis eldonata ĉiumonate kaj pliampleksigata.

ZAMENHOF DIRIS : Se nin, la unuajn batalantojn por Esperanto, oni devigos, ke ni evitu en nia agado ĉion idean, ni indigne deŝiros kaj bruligos ĉion, kion ni skribis por Esperanto, ni neniigos kun doloro la laborojn kaj oferojn de nia tuta vivo, ni forĵetos malproksimen la verdan stelon, kiu sidas sur nia brusto . .

*Barcelona Homarano omaĝe al D-ro Zamenhof.*

### EKLUDO

Nova Esp. Kartludo, prezo ned. guld. 2 aŭ samvaloro

Mendu ĉe R. V. D. Outenaar,  
Merkmanstr. 5, Haarlem, Nederlando

Pagebla ĉe Ned. Handelsmij,  
Spaarne Haarlem, Nederlando  
(Ned. komerca societo)

## STATUTO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(Reviziita Julion 1955)

### I. ĜENERALAJ PRINCIPOJ

1. **Titolo.** La nomo de la asocio estas : Universala Esperanto-Asocio (UEA). La Universala Esperanto-Asocio (fondita la 28an de aprilo 1908) kaj Internacia Esperanto-Ligo (fondita 1936) kunfandiĝis en unu organizaĵon kun la nomo Universala Esperanto-Asocio je la 28a de aprilo 1947.

2. **Konsisto.** La Asocio konsistas el Esperantistaj organizaĵoj, asociaj kaj individuaj membroj.

3. **Celoj.** Ĝiaj celoj estas :—

disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto ;  
plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco pri nacieco, raso, religio, politiko aŭ lingvo ;

kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco, kaj disvolviĝi ĉe ili la komprenon kaj estimon por fremdaj popoloj ;

zorgi pri la kunagado de Esperantistaj organizaĵoj ;

krei internaciajn servojn uzeblajn de ĉiuj homoj, kies intelektaj aŭ materiaj interesoj celas trans la limojn de ilia genta aŭ lingva teritorio ;

okazigi la Universalajn Esperanto-Kongresojn kaj aliajn kongresojn kaj konferencojn.

Por la plenumo de siaj celoj la Asocio rajtas akcepti aŭ akiri proprajojn kaj povas elekti kuratorojn por daŭre posedi tiujn laŭ kondiĉoj difinitaj de la Komitato.

4. **Neŭtraleco.** UEA estas neŭtrala rilate al nacieco raso, religio, politiko kaj sociaj problemoj.

UEA deklaras, ke la respekto de la homrajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo. Ĝia sinteno estas diktata de la ideoj celoj de la Esperanto-movado. Ĝi rilatas simpatie al ĉiuj movadoj, kiuj sur ne-politika bazo klopodas efektivigi ideojn identajn tute aŭ parte kun la celoj de la Asocio.

5. **Lingvo.** La oficiala lingvo de UEA estas la Zamenhofa lingvo Esperanto, tia kia ĝi estas difinita per sia fundamento kaj per sia verkaro.

6. **La Sidejo.** La ĉefsidejo de la Asocio estas en Anglujo. La sidejo de la Serva Centro estas en Genève, Svislando. La Estraro rajtas funkciigi aliajn oficejojn laŭbezone.

7. **Administra jaro.** La administra jaro estas la kalendara jaro.

8. **Ofic-daŭro.** Ĉiuj oficoj daŭras tri jarojn; la ofico-havantoj estas reelekteblaj. La organoj, kiuj laŭ la statuto elektas la oficohavantojn, povas al ili esprimi sian mal-konfidon pli frue kaj je ilia loko elekti aliajn.

9. **Respondeco.** Pri la agoj de siaj reprezentantoj kaj oficistoj la Asocio estas nur tiom respondeca, kiom tiuj agoj okazis lau la kompetenteco kiun por ĉiu ofico difinas la statuto aŭ la regularoj.

La Asocio malakceptas ĉiun financon respondecon pri la funkciado de la servoj.

Tiu ĉi statuto kaj la regularoj estas devigaj por ĉiuj aliĝintaj organizaĵoj kaj membroj.

## II. MEMBRECO

10. **Membro-kategorioj.** La Asocio havas jenajn kategoriojn de membroj.

(a) Asociaj Membroj (A.M.) are aligitaj de la aliĝintaj asocioj.

(â) Individuaj Membroj, individue enlistigitaj de UEA.

(c) Honoraj Prezidantoj kaj Membroj.

11. **Akcepto de membroj.** Kiel Individua Membro povas esti akceptata ĉiu honorinda persono.

12. **Apogantoj de UEA** estas personoj, kiuj apogas la celojn de la Asocio, kaj kiuj estas akceptitaj laŭ la kondiĉoj en la Ĝenerala Regularo. La apogantoj havas neniajn rajtojn en la Asocio.

## III. LANDAJ ASOCIOJ

13. **Aliĝkondiĉoj.** Ĉiu Landa Asocio Esperantista povas aliĝi al UEA, se ĝi havas la nombron da membroj fiksitajn en la Ĝenerala Regularo, se ĝi estas laŭorde organizita kaj se vidiĝas klare el ĝia statuto, ke temas pri asocio neŭtrala laŭ la senco de Par. 4. Principe UEA akceptas el unu regno nur unu landan asocion.

Landa Asocio pagas por ĉiuj siaj membroj, kiuj ne estas individuaj membroj de UEA, sumon difinitan en la Ĝenerala Regularo.

## IV. ALIAJ ORGANIZAĴOJ

14. **Aliĝkondiĉoj.** La internaciaj Esperantistaj fakaj asocioj neŭtralaj povas aliĝi al UEA laŭ la samaj kondiĉoj kiel la landaj asocioj.

15. **Kontraktoj kun Fakaj Asocioj.** Kun internacia Esperantista faka asocio neŭtrala la Asocio povas fari kontrakton pri komuna agado, interŝanĝo de servoj k.t.p. La Estraro estas rajtigita fari kun ĝi kontrakton pri speciala kotizo aŭ pri aliĝo de ĝiaj membroj kiel asociaj aŭ individuaj membroj de UEA.

La Komitato aprobas aŭ malaprobas kontraktojn kun la fakaj asocioj.

16. **Kontraktoj kun neneŭtralaj asocioj.** La Asocio rajtas fari kontraktojn pri kunlaboro kaj interŝanĝo de servoj k.t.p. kun internaciaj neneŭtralaj Esperantistaj asocioj, kondiĉe ke tiuj rilatoj ne estu en kontraŭeco kun la principo de Par. 4.

17. **Kontraktoj kun landaj fakaj asocioj.** La Asocio povas fari kontraktojn laŭ la samaj kondiĉoj kun landaj fakaj asocioj Esperantistaj post la aprobo de la koncerna landa asocio, se ĉi tiu aliĝis al UEA.

18. **Apogantaj Organizaĵoj.** Ne-Esperantistaj organizaĵoj, kiuj deziras montri sian simpatian al la Esperanto-movado, povas kiel apogantaj organizaĵoj esti akceptataj de la Estraro laŭ kondiĉoj en la Ĝenerala Regularo.

## V. EKSIĜO KAJ EKSIĜO

19. **Eksiĝo.** Membro aŭ organizaĵo, kiu dum la kuranta jaro, malgraŭ averto, ne pagis la koncernen kotizon, estas konsiderata kiel eksiĝinta.

20. **Eksigo.** Membro aŭ organizaĵo, kiu evidente kontraŭlaboras la celojn de UEA, aŭ ne kontentige plenumas siajn devojn al UEA, povas esti eksigita de la Asocio. La Estraro estas kompetenta pri la eksigo de la individuaj membroj kaj la Komitato pri la eksigo de organizaĵoj, post esploro laŭ la kondiĉoj en la Ĝenerala Regularo.

## VI. ĈEFDELEGITOJ, PERANTOJ KAJ DELEGITOJ

21. Por reprezenti la Asocion en la diversaj landoj oni nomas Ĉefdelegiton aŭ Peranton.

En ĉiuj lokoj UEA povas esti reprezentata de Delegito, Vic-delegitoj kaj Fak-delegitoj.

22. La Delegito varbas membrojn kaj funkciigas la servojn laŭ la kondiĉoj difinitaj en la Ĝenerala Regularo. La delegiteco estas sensalajra ofico.

23. **Elektito.** Delegitoj estas nomataj aŭ elektataj ĉiun trian jaron. Intertempe nomitaj Delegitoj funkcias ĝis la fino de la periodo.

## VII. KOMITATO

24. **Konsisto.** La gvidado de la Asocio estas konfidata al la Komitato de UEA.

Ĝi estas elektata ĉiun trian jaron kaj konsistas el :

Komitatoj A, elektitaj de la aliĝintaj asocioj;

Komitatoj B, elektitaj de la Ĉefdelegitoj kaj Delegitoj;

Komitatoj C, al-elektitaj de la Komitatoj A kaj B.

25. **Elektito.** (a) Ĉiu aliĝinta asocio kun 150 ĝis 1,000 membroj elektas unu Komitatanon kaj unu plian por ĉiu komencita milo. La nombro de la Komitatoj de ĉiu asocio restas sen ŝanĝo dum la oficperiodo, sed asocio, kiu aliĝas aŭ atingas pluan milon, elektas Komitatanon aŭ Komitatojn por la resto de la periodo. Eksiĝintaj kaj mortintaj Komitatoj povas esti anstataŭataj. Por la membronombro validas la ciferoj je la 31-a de decembro de la antaŭa jaro.

Se la nombro de la Komitatoj A superas 40 personojn la Komitato rajtas plialtigi la supre fiksatajn elektociferojn.

(b) La Ĉefdelegitoj kaj Delegitoj elektas el internacia listo, pretigita laŭ la kondiĉoj en la Ĝenerala Regularo, unu Komitatanon por 250 Delegitoj. La Vic-delegitoj kaj Fak-delegitoj ne partoprenas tiun ĉi voĉdonon.

(c) Por certigi al la Asocio la kunlaboron de spertuloj la Komitatoj A kaj B povas kompletigi la Komitaton, elektante pliajn Komitatojn per sekreta voĉdono ĝis la kvarono de sia propra nombro.

Salajrata oficisto de UEA ne povas esti Komitato.

Ĉiuj Komitatoj estas samrajtaj kaj reelekteblaj. Tamen ne estas reelektbla Eŭropa Komitato, kiu persone ĉeestis neniun Komitat-kunsidon dum la du lastaj oficperiodoj.

26. **Anstataŭantoj.** Komitato elektita de Landa Asocio (grupo A), kiu ne povas partopreni Komitatkunsidon, devas nomi anstataŭanton, skribe aprobotan de la koncerna Asocio. Tiu anstataŭanto havas dum la koncerna kunsido la samajn rajtojn kiel ĉiu alia Komitato.

27. **Rolo.** La Komitato

elektas inter siaj membroj Prezidanton, unu aŭ du Vicprezidantojn, Ĝeneralan Sekretarion kaj du ĝis kvar pliajn membrojn de la Estraro,

rajtas nomi Honoran Prezidanton kaj Honorajn Membrojn,

difinas la ĝeneralan agadon de UEA.

decidas pri aliĝo de Landaj kaj Fakaj Asocioj kaj pri kontraktoj kun Fakaj Asocioj,

decidas pri la Regularoj,

aprobas la budĝeton kaj ekzamenas la financojn de la Asocio,

decidas pri la agado de la Estraro,

decidas pri la aferoj ne rezervitaj al aliaj instancoj.

## VIII. ESTRARO

28. **Konsisto.** La Estraro de UEA konsistas el la Prezidanto, unu aŭ du Vic-Prezidantoj, la Ĝenerala Sekretario kaj el du ĝis kvar pliaj Estraranoj. La anoj de la Estraro loĝu prefere en landoj ne tro malproksimaj de la Asocia sidejo kaj deklaru sin pretaj partopreni la kunsidojn de la Estraro kaj de la Komitato.

29. **Rolo.** La Estraro, kiu estas respondeca al la Komitato :

elektas la Redaktoron de la *Revuo Esperanto*,

nomas kaj maldungas la Administranton de Centra Oficejo (CO) kaj la direktorojn aŭ administrantojn de eventuale aliaj oficejoj,

okazigas la Universalajn kaj aliajn Kongresojn kaj Konferencojn,

kreas novajn servojn kaj aranĝojn,

prezentas al la Komitato proponon pri la budĝeto kaj respondecas pri la financoj de UEA,

plenumas la decidojn de la Komitato.

**30. Funkcioj.** La Prezidanto de UEA reprezentas la Asocion kaj subskribas kun la Ĝenerala Sekretario la ĉefajn dokumentojn. Li prezidas la Komitaton, la Estraron kaj la kongresojn de UEA. Li kontrolas aŭ kontroligas minimume unu fojon ĉiujare la oficejojn. Li rajtas delegi alian Komitatanon por difinita tasko. En esceptaj okazoj li havas la povon de la Estraro aŭ de la Komitato, al kiuj li raportu kiel eble plej baldaŭ por aprobo.

La Vicprezidantoj laŭnecese anstataŭas la Prezidanton.

La Ĝenerala Sekretario zorgas pri la efektivigo de la decidoj de la Komitato kaj Estraro; kunmetas la jaran raporton pri la laboro de la Asocio kaj ellaboras la planon de la laboro por la estonta jaro; prizorgas la mondan informadon pri Esperanto; gvidas la eksterajn rilatojn de la Asocio; plenumas aliajn taskojn, kiujn la Komitato aŭ la Estraro donas al li. La Ĝenerala Sekretario povas ricevi kompenson, fiksitan de la Komitato.

La ceteraj Estraranoj plenumas laŭbezone komisiitajn taskojn.

## IX. LABORMANIERO

**31. Kunsidoj.** La Komitato kunvenas okaze de la Universal Kongreso; krom tio la Estraro kunvenas almenaŭ unufoje ĉiujare en la Centra Oficejo.

**32. Voĉdonado.** En voĉdonadoj validas la plimulto de la voĉdonintoj; okaze de voĉegaleco decidus la Prezidanto. Decidoj, kiujn partoprenis malpli ol duono de la Komitato aŭ de la Estraro, devas poste esti submetataj al skriba voĉdono, en kiu sufiĉas la plimulto de la voĉdonintoj. Komitatano sin detenas de voĉdono pri aferoj, kiuj koncernas lin persone.

**33. Komisioj.** Por esplori iujn problemojn, aŭ por la plenumo de difinitaj administraj taskoj, la Komitato aŭ la Estraro povas elekti inter aŭ ekster si reprezentanton aŭ specialajn komisionojn kun kontrolpovoj, sed ne rajtas transdoni al ili siajn povojn.

**34. Kompenso.** Por kovri la administrajn kaj vojaĝajn elspezojn de la Estraranoj la Komitato asignas certan sumon en la Budĝeto. La Komitato povas asigni al Komitatano kompenson por speciala tasko, kies plenumo postulas grandan tempoperdon.

## X. UNIVERSALA KONGRESO

**35. Celoj.** La Universal Kongreso estas internacia manifestacio de la Esperantistaro. Ĝi celas fortigi la solidarecon inter Esperantistoj, progresigi la movadon kaj studi ĝiajn problemojn. La oficiala lingvo estas Esperanto.

La organizo de la Universalaj Kongresoj estas fiksita de la Komitato en la Kongresa Regularo.

## XI. OFICEJOJ

**36. Centra Oficejo.** La Centra Oficejo (C.O.) de la Asocio estas gvidata de Administranto, kiu respondecas pri la taskoj de "Secretary" laŭ la brita leĝaro. Liajn laborkondiĉojn kaj salajron fiksas la Estraro. Li estras la tutan teknikan-administran laboron de la Asocio kaj preparas la budĝeton. Li sciigas la Ĝeneralan Sekretarion pri ĉiuj gravaj okazintaĵoj de la oficejo kaj submetas al la Estraro la aferojn bezonantajn ilian aprobon. Iniciato de proceso apartenas al la Estraro. Dokumentoj, en kiuj UEA devigas sin al garantio, mendo aŭ pago je pli ol £50 devas porti la subskribon de la Prezidanto aŭ de la Ĝenerala Sekretario, kaj de la Administranto. Tio ne validas por la normala funkciado de la Oficejo.

La oficistoj de la Centra Oficejo estas nomataj de la Administranto, kiu fiksas iliajn salajrojn laŭ la bezono kaj la oficeja kutimo. Li raportas al la Estraro por aprobo.

## XII. REVUO, BIBLIOTEKO

**37. Revuo.** La oficiala organo de la Asocio estas *Esperanto*, fondita de H. Hodler. *Esperanto* estas redaktata en la spirito de la fundamenta principo de la Asocio (par. 4) kaj laŭ la ĝeneralaj gvidlinioj kiujn fiksas la Estraro.

38. **Biblioteko kaj Arkivo.** La Biblioteko de UEA portas la nomon "H. Hodler." Ĝi estas registrita en la listo de la specialigitaj bibliotekoj sub la titolo : Bibliothéque de la Langue Internationale.

### XIII. FINANCOJ

39. **Administrado.** La Centra Oficejo administras ĉiujn monaferojn de la Asocio, kun escepto de la kapitaloj, kaj publikigas la jarbilancon.

40. **Reviziado.** Ĉiujare la tuta librotenado devas esti ekzamenata de revizoro leĝe rekonita, nomita de la Komitato.

La Komitato rajtas nomi komisionon inter siaj membro por kontroli la tutan agadon de ĉiuj oficejoj.

41. **Asocia kapitalo.** La kotizoj de Dumvivaj Membroj, donacoj superantaj sumon fiksoitan de la Komitato kaj sen specialaj celoj, heredaĵoj k.t.p. formas la Asocian Kapitalon. La Estraro decidas pri eventuala uzo kaj ebla investo de la mono; ĝi rajtas elekti specialan administranton.

### XIV. ĜENERALA VOĈDONO

42. **Okazigo.** Ĝenerala Voĉdono okazas :

se la Komitato aŭ, okaze de urĝeco, la Estraro ĝin decidas;

se aliĝintaj asocioj reprezentantaj kvaronon de la membraro ĝin postulas per sia subskribo, en tempolimo de tri monatoj, kalkulita de la unua ĝis la lasta subskribo.

La Administranto ĝin aranĝas plej malfrue du monatojn post ricevo de sufiĉa nombro da subskriboj. Je propono pri statutŝanĝo okazas voĉdono pri ĉiu aparta paragrafo.

Tiu voĉdonado povas nuligi ĉiujn elektojn kaj decidojn, ŝanĝi la Statuton kaj dissolvi la Asocion; krome ĝi povas esprimi sin pri demandoj submetitaj de la Komitato.

43. **Kalkulo de voĉoj.** Ĉiu aliĝinta asocio havas nombron de voĉoj egalan al la nombro de siaj membroj.

Por voĉdonado validas la nombro de la membroj, por kiu la aliĝinta asocio pagis en la jaro antaŭ la voĉdonado. Por novaliĝinta asocio validas la nombro por kiu ĝi jam pagis, sed almenaŭ la minimuma nombro, kiu rajtigas al aliĝo.

En lando kie ne ekzistas aliĝinta landa asocio la membroj voĉdonas individue.

En voĉdono validas la plimulto de la voĉoj esprimitaj. Por ŝanĝi la Statuton aŭ dissolvi la Asocion necesas du trionoj de la esprimitaj voĉoj, kondiĉe ke tiuj voĉoj reprezentu minimume duonon de la membraro.

44. **Kontrolo.** La ĝenerala voĉdonado estas skriba, kaj la voĉoj estas kalkulataj 90 tagojn post la forsendo de la voĉdoniloj. La voĉdonilojn kontrolas tri membroj nomitaj de la Komitato. Tiuj membroj skribe certigas la korektecon de la procedo. Komitatanoj rajtas ĉeesti kaj subskribi.

### XV. DISSOLVO

45. En okazo de dissolvo de la Asocio la restanta havaĵo estas donacata al alia Esperanto-organizaĵo, kiun indikas la decido pri dissolviĝo.

## ĜENERALA REGULARO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(Reviziita Septembron 1955)

1. **Difinoj.** En ĉi tiu Regularo, escepte se la teksto formale montras alian sencon :

"La Asocio" signifas "Universala Esperanto-Asocio";

"Membro" signifas membron de iu ajn kategorio;

"Delegito" signifas Delegiton (D), Vicdelegiton (VD) aŭ Fakdelegiton (FD) de UEA.

"Administranto" signifas Administranton de la C.O.

2. **Aliĝkondiĉoj.** La minimuma nombro de membroj (Individuaj aŭ Asociaj) por la aliĝo de esperantista organizaĵo laŭ la Statuto Par. 13 kaj 14 estas 150.

La kotizo pagota de la esperantistaj organizaĵoj por la Asociaj Membroj estas po 0.50 angla ŝilingo por ĉiu membro.

Individuaj Membroj ricevas la membrokarton, membro-markojn kaj diversajn eldonaĵojn laŭ la jenaj subkategorioj :

(i) MJ —Membro kun Jarlibro : la jarlibron.

(ii) MA —Membro-Abonanto : la jarlibron, kaj la monatan gazeton.

- (iii) MS —Membro-Subtenanto : la jarlibron, kaj la monatan gazeton. Tiu pagas pli altan kotizon por helpi al la organizaĵo.
- (iv) Pat. —Patrono : la jarlibron kaj la monatan gazeton. Tiu pagas la dekoblan MA-kotizon por plifortigi la organizaĵon.
- (v) DM—Dumviva Membro : tiu pagas sumon fiksiton de la Komitato por kovri la kotizon, kiel MA, dum la vivo.

La kotizoj por la Individuaj Membroj estas :

Membro kun Jarlibro : 7.50 anglaj ŝilingoj.

Membro-Abonanto : 20.00 anglaj ŝilingoj.

Membro-Subtenanto : 30 anglaj ŝilingoj.

Dumviva Membro : 20 anglaj pundoj.

La Administranto fiksis la sumon por ĉiu lando en nacia mono, konforme al la kurzo kaj al la praktikaj bezonoj.

Delegito, Ĉefdelegito aŭ la Administranto rajtas malakcepti aliĝpeton. En tia okazo ili informu unu la alian. Se malakceptita kandidato tion speciale deziras, oni informas lin pri la motivo. Ĝis tridek tagoj post ricevo de la motivo, tri individuaj membroj rajtas kune peti la Ĝeneralan Sekretarion ke li decidu pri la aliĝo.

**3. Apogantoj.** Kiel apoganto povas esti akceptata ĉiu persono, kiu apogas la celojn de la Asocio. La apoganto pagas unufoje por ĉiam minimuman kotizon, difinitan de la Komitato. La apoganto ricevas specialan ateston sed ne havas iajn rajtojn en la Asocio.

La kotizo por Apoganta Organizaĵo estas 5 anglaj pundoj. Informo pri tiaj organizaĵoj aperas en la jarlibro.

**4. Delegitoj.** La Delegitoj estas elektataj por servi al la membroj kaj por reprezenti la Asocion. Delegito devas esti Individua Membro de UEA. Li plenumas laŭeble la jenajn kondiĉojn :

Li estu plenaĝa enlandano daŭre loĝanta en sia regiono, abonu kaj regule legu la oficialan revuon, konu bone la Esperantan lingvon kaj movadon, klopodu havi bonajn rilatojn kun la lokaj Esperanto-societoj. Li promesu, sub rezervo de gravaj malhelpoj, zorge plenumi sian oficon dum minimume trijara periodo.

Ĉiu D, VD kaj FD devas esti Individua Membro jam dum minimume unu jaro antaŭ nomigo.

5. La Delegito prizorgas administrajn aferojn laŭ instrukcioj de la Centra Oficejo; konservas en bonordo la leterojn kaj dokumentojn de sia ofico.

6. Vicdelegito helpas kaj anstataŭas la Delegiton. La reguloj starigitaj por la Delegito validas laŭsence por li.

7. Fakaj Delegitoj estas elektataj pro sia sperto, kaj respondas al tiurilataj informpetoj.

8. Delegito ne rajtas fari en la nomo de UEA mendojn aŭ elspezojn sen skriba permeso de la Administranto.

9. Delegito rajtas rifuzi la laŭregularan peton de servo, kiun li opinias neakordigebla kun sia honoro aŭ konscienco. Li sciigas pri tio la petinton.

Al membroj, kiuj misuzas la aranĝon de la Asocio, li rajtas rifuzi siajn servojn, informante la petinton kaj la Administranton.

Propravole farante servojn al ne-membroj, li klopodas varbi ilin por UEA.

10. En landoj, kies asocioj aliĝis, la Landa Asocio nomas aŭ nomigas la Delegitojn, interkonsente kun la Ĉefdelegito. En okazo de malkonsento decidas la Estraro de UEA.

En la aliaj landoj la Delegitoj estas nomataj de la Ĉefdelegito, de la Peranto aŭ de la Administranto de C.I., se loĝas en la loko malpli ol dek Individuaj Membroj. En regiono, kie ekzistas minimume dek Individuaj Membroj, ili rajtas okazigi kunvenon kaj mem elekti sian Delegiton.

11. La nomoj de ĉiuj novaj Delegitoj estas publikigataj en la oficiala revuo. Se ĝis 60 tagoj post ĝia forsendo neniu membro protestas pro grava kaŭzo, la nomado aŭ elekto fariĝas valida. Intertempe la Delegito funkcias provizore.

Se la Administranto opinias, ke nova Delegito ne taŭgas por la ofico, li haltigas la publikigon, informante la rifuziton pri siaj motivoj.

Ĝis 30 tagoj post oficiala informo pri kontraŭstaro de iu membro aŭ de la Administranto, la rifuzito aŭ liaj elektintoj povas peti la finan decidon de la Prezidanto.

Delegito povas esti revokata el sia ofico nur per procedo de oficiala plendo. Se dum la ofic-periodo la rajto nomi



Delegiton transiras al Landa Asocio, ĉi tiu ne rajtas elficigi la funkciajn Delegitojn ĝis la periodfino.

12. Delegito, kiu ne povas funkcii pro foriro el la regiono, grava malsano, k.t.p., informu kiel eble plej baldaŭ la Ĉefdelegiton aŭ la Administranton. Se la Delegito ne tion faras, tiam skribu Vicdelegito. Nova Delegito reprenas de la antaŭa Delegito, aŭ de la Vicdelegito, la tutan materialon kaj dokumentaron de UEA.

13. **Ĉefdelegitoj.** Ĉefdelegito prizorgas la administradon en sia regiono, se la Landa Asocio mem ne faras tion.

Laŭ ebleco li faras raporton dum la jarkunveno de la Landa Asocio kaj varbas por UEA.

14. En lando, kies asocio aliĝis al UEA, la Ĉefdelegito estas nomata de la Landa Asocio interkonsente kun la Ĝenerala Sekretario.

15. En lando, kies asocio ne aliĝis, la Administranto nomas, se necese, Ĉefdelegiton aŭ Peranton.

16. **Peranto.** En lando kun malpli ol dek kvin Delegitoj oni kutime ne nomas Ĉefdelegiton. Tamen la Administranto povas nomi Peranton, kies devoj estas ĝenerale tiuj de Ĉefdelegito.

17. **Administrado.** La kostoj de la Administrado de la Individuaj Membroj kaj aliaj teritoriaj elspezoj estas pagataj per depreno el la enspezoj laŭ procentaĵo. La Estraro starigas la kondiĉojn kaj fiksas laŭ cirkonstancoj la parton, donotan al la Landa Asocio, Ĉefdelegito aŭ Peranto.

La jarpago de aliĝinta organizaĵo por la asociaj membroj ne estas teritoria enspezo kaj iras senrabate al la Centra Kaso. Por la administrado de la asociaj membroj UEA ne donas kompenson, sed liveras proprakoste al la Landa Asocio la bezonatan nombron da membrokartoj kaj membromarkoj.

18. **La Serva Centro de UEA.** estas la oficejo en Ĝenevo. La loka kaj enlanda titolo estas: Bureau International de l'Esperanto.

La Serva Centro ĝuas juran personecon konforme al Art. 60 de la Svisa civila kodo. La Prezidanto povas per aparta skriba rajtigilo transdoni al la administranto sian rajton laŭleĝe reprezenti la Servan Centron.

La Asocio ne respondecas pri la sindevigoj de la Serva Centro antaŭ la 28a de aprilo 1947.

19. **Servoj.** Al informpetoj kaj al aliaj ne pure administraj korespondaĵoj oni ĉiam aldonu:

(a) membromarkon de UEA por la kuranta jaro.

(b) respondkarton aŭ enordan poŝtan respondkupuponon.

Delegito rajtas malamenti petojn kiuj ne plenumas la ĉi-suprajn kondiĉojn.

En tempolimo de 14 tagoj post ricevo de laŭregula informpeto la Delegito devas ĝin zorge respondi.

Devas esti nepre rifuzataj: petoj de servoj kontraŭ la celoj de UEA aŭ la bonaj moroj; petoj havantaj konfidencan karakteron (pri morala indeco, pagokapablo aŭ familiaj cirkonstancoj de persono) kaj ripetitaj petoj de ne-membroj.

20. Dum vojaĝoj membroj povas peti konsilon de la Delegito pri ĉiuj turismaj aferoj kaj lian helpon, se okazis al li malagrabloj en hoteloj, magazenoj, ĉe doganoj aŭ aliaj aŭtoritatoj, k.t.p. Granda perdo de tempo kaj elspezoj estu pagataj.

La Delegito donas ĉiujn informojn por faciligi la restadon, sed ne estas lia devo iri al rendevuoj, atendi la membrojn en la stacidomo aŭ ilin promenigi.

21. Antaŭ ol fari servon kiu kaŭzus elspezojn, la Delegito demandu la petinton kaj postulu antaŭan pagon. La Delegito ankaŭ rajtas peti antaŭan pagon, aŭ rajtas malakcepti servojn kiuj necesigas multan tempon, teknikajn konojn, aŭ specialajn klopodojn por kiuj salajro aŭ maklerpago estas kutimaj. Se li ne volas fari la servon li respondu kaj sendu laŭeble liston de personoj aŭ firmoj, kiuj prizorgas tiajn negocojn.

22. La Delegito estas respondeca pri bona funkciado de la nomitaj servoj en sia loko. Li zorgu, ke dum lia foresto la korespondaĵoj estu transdonataj al Vicdelegito.

Interŝanĝo de poŝtmarkoj kaj karto, rondirigo de leteroj aŭ petskriboj k.t.p. ne koncernas la servon de informpetado, sekve estas neniel devigaj por la Delegito.

23. **Plendoj.** Plendoj pri malbone faritaj servoj estu klare priskribataj kaj estu sendataj al la Ĉefdelegito, Peranto, aŭ la Administranto.

24. Plendoj de membroj kontraŭ aliaj membroj, Delegitoj kaj la Centra Oficejo estu laŭ la kazo adresataj al la Ĉefdelegito, Peranto, aŭ Administranto de UEA. La

ricevinto informiĝas kaj rajtas postuli de ĉiu membro la alsendon de la necesaj dokumentoj. Se la plendo montriĝas ĝusta, oni riproĉas la kulpigiton. Se necese, la Ĝenerala Sekretario aŭ la Administranto procedas konforme al la sekvantaj artikoloj.

25. **Eksigo el ofico.** Membroj, kiuj malbone plenumis oficon al ili konfiditan de la Asocio, povas en urĝaj kazoj esti haltigitaj en siaj funkcioj per decido de la Administranto. Pri revoko el la ofico estas kompetenta:

ĉe helpantoj, oficistoj kaj sekretarioj: la persono kiu ilin dungis;

ĉe Delegitoj: la Prezidanto;

ĉe pli altaj ofic-havantoj: La Estraro.

Ofic-havanto povas ankaŭ esti eksigita el sia ofico pro misuzo de konfiditaj monsumoj kaj dokumentoj, aŭ se li misuzas sian titolon aŭ kompetentecon.

En ĉiuj okazoj de eksigo el la ofico la eksigito rajtas apelacii plej malfrue la 30-an tagon post la ricevo de la decido: al la Komitato, se estis kompetenta la Estraro, kaj al la Estraro en ĉiuj aliaj okazoj.

26. En malpli gravaj okazoj la eksigo el ofico povas esti anstataŭigita per oficiala postulo ke la kulpigito eksigu mem, en tempolimo fiksita.

27. **Eksigo el la Asocio.** En okazo de eksigo laŭ par. 20 de la Statuto individua membro aŭ organizaĵo estu informita pri la plendo per registrita letero. La kulpigito rajtas sendi sian defendon en tempolimo de 30 tagoj post ricevo de tiu sciigo. La Estraro aŭ Komitato povas nomi specialan komisionon por esplori la aferon. Kontraŭ la decido de la Estraro la kulpigito rajtas apelacii al la Komitato plej malfrue la 30-an tagon post la ricevo de la decido. La decido de la Komitato estas definitiva.

Se esploro de afero necesigas grandan korespondadon, longan laboron aŭ gravajn elspezojn, la kompetenta instanco rajtas postuli de la partioj la kostojn de la proceduro.

Nova aliĝo de eksigita membro aŭ organizaĵo validas nur, se konsentis la instanco, kiu decidis pri la eksigo.

28. **Elekto de Komitatanoj B.** La elekto de la Komitatanoj B en la senco de la par. 25(a) de la Statuto okazas laŭ jena maniero:

(a) Je 250 ĉefdelegitoj kaj delegitoj laŭ la stato de la 31-a de decembro de la pasinta jaro estas elektata

po unu Komitatano B. Ĉiu komencita ducentkvindeko rajtigas al plia Komitatano B.

- (â) La Administranto publikigas informon en la oficiala organo de la Asocio, ke okazos la elektoj, precizigas la nombron de elektotaj Komitatanoj B kaj petas la ĉefdelegitojn kaj delegitojn (ne la vicdelegitojn aŭ fakdelegitojn) sendi proponojn pri kandidatoj kun iliaj skribaj konsentoj ĝis difinita dato, kiu estu proksimume 45 tagoj post la apero de la informo.
- (c) Kvin ĉefdelegitoj aŭ delegitoj rajtas proponi unu kandidaton el inter la individuaj membroj de la Asocio; la kandidato devas skribi konsenti al sia kandidatiĝo.
- (d) Post la forpaso de la fiksita dato la Administranto konstatas la nombron de kandidatoj surbaze de valide faritaj proponoj. Se la nombro de kandidatoj ne superas la nombron de elektotaj Komitatanoj B, voĉdonado ne okazas, sed ĉiuj kandidatoj estas konsiderataj kiel elektitaj. Se la nombro de kandidatoj superas tiun de elektotaj Komitatanoj B, la Administranto kunmetas liston de ĉiuj kandidatoj kaj forsendas ĝin, kune kun la voĉdonilo, al ĉiuj ĉefdelegitoj kaj delegitoj, kiuj rajtas voĉdoni. Samtempe li aŭ ŝi informas pri la nombro de elektotaj Komitatanoj B, pri la limdato por la ricevo de la voĉdoniloj en la oficejo (minimume 45 tagoj post la dato de la forsendo de la voĉdoniloj) kaj pri la maniero de la voĉdono. La voĉdonantoj signas per kruceto la nomojn de tiuj kandidatoj sur la voĉdonilo, por kiuj ili voĉdonas, metas la daton, subskribas la voĉdonilon kaj sendas ĝin en fermita koverto kun la indiko "voĉdonilo B" al la adreso de la oficejo. La malfermado de la koverto kaj nombrado de la voĉoj okazas antaŭ komisiono, konsistanta el Administranto kaj du individuaj membroj, nomitaj de la Estraro. Ĉefdelegito, delegito aŭ Komitatano rajtas ĉeesti. Ne estas valida tiu voĉdonilo, sur kiu mankas la subskribo, aŭ kiu ne atingas la oficejon en la fiksita tempolimo, aŭ per kiu estas voĉdonite por pli da kandidatoj ol estas la nombro de elektotaj Komitatanoj. Estas elektitaj tiuj kandidatoj, kiuj ricevis plej multe da voĉoj. En okazo de voĉegaleco decidias, se necese, loto. Pri la rezulto aperas informo en la gazeto.

## REGULARO

### PRI LA SERVO DE INFORMPETO

**Fundamenta Principo:** Ĉiu membro rajtas uzi la servojn de la Delegitoj. La servoj mem estas senpagaj, sed la uzanto devas repagi la elspezojn de la Delegito.

**Oni rajtas peti informojn** pri: Komerco, industrio, trafiko, laboro, dungo, salajroj, turismo, instruado, junulaj, studentaj kaj virinaj aferoj, k.t.p. Pri fakdemandoj oni skribu rekte al la faka Delegito, se tia ekzistas.

**Oni ne rajtas peti informojn** pri: Komerca pagokapablo, morala indeco de persono (konfidencaj informoj). Tamen, tiukaze la Delegito rajtas interrilati kun loka agentejo, kiu sin okupas pri tio.

La Delegito rajtas rifuzi servojn, kies plenumon li juĝas kontraŭa al sia honoro aŭ konscienco.

**Plendoj:** Informpeto ne respondita de la Delegito normale 14 tagojn post ĝia ricevo, rajtigas la petinton plendi ĉe la Administranto, kiu enketos. Oni ankaŭ plendu okaze de malbone farita servo.

**Atentu:** 1. Skribu tre legeble, precipe la adreson. Tiu ĉi estu skribata ĉiam en nacia lingvo kaj per latinaj literoj.

2. Skribu sur la adresflankon post la nomo, la titolon Delegito de U.E.A., tiel, ke se la Delegito forestas, la letero estu transdonata al la Vic-delegito.

3. Aldonu post la subskribo la membromarkon por montri vian membrecon, kaj ripetu sur ĉiu sendaĵo la plenan adreson. Stampo kun adreso estas rekomendata.

4. Aldonu al la informpeto respondkuponon.

5. Skribu ĉiam en Esperanto, la oficiala lingvo

de U.E.A. La uzo de nacia lingvo nuligas la rajton al plendo.

6. Aŭfranku sufiĉe la korespondaĵon.

7. Ne forgesu, ke la delegiteco estas sensalajra ofico, kiun la Delegito akceptis por utili al Esperanto. Sekve faciligu lian taskon, ne ĝenante lin per petoj tute malgravaj.

Ĉi tiuj reguloj validas laŭsence ankaŭ por la rilatoj kun la oficejo de U.E.A.

**Dum Vojaĝo:** Ĉar la Delegito plej ofte ne disponas libere pri sia tempo, la membroj vojaĝantaj skribe informu la Delegiton pri sia vizito, minimume unu semajnon antaŭe.

La Delegito havas la devon helpi la vojaĝanton. Sed oni memoru, ke ne estas la tasko de la Delegito atendi la fremdulojn en la stacidomoj, ilin akompani, fari komisionojn por ili, k.t.p.

\* \* \*

**Ne forgesu,** ke post ricevo de informo aŭ helpo de delegito ordinara ĝentileco postulas, ke vi sendu al li dankesprimon aŭ minimume konfirmon ke vi bone ricevis la sendaĵon.

## REGULARO

por la elekto de Honoraj Membroj (HM) kaj Honoraj Prezidantoj (HP) de U.E.A.

### I.

(a) La Komitato de U.E.A. povas, surbaze de la par. 10(c) kaj 27 de la Statuto, aparte distingi esperantistojn aŭ aliajn personojn, kiuj faris gravajn servojn al la tutmonda Esperanto-Movado, per la titolo "Honora Membro" (HM).

(b) Kiel Honora Prezidanto (HP) povas esti nomita nur esperantisto, kiu, krome, havis eksterordinarajn meritojn por U.E.A. Honora Prezidanto rajtas ĉeesti la kunsidojn de la Komitato.

### II.

(a) La proponon por elekto de HM aŭ de HP rajtas fari : (1) la Estraro de U.E.A.; (2) minimume tri landaj aŭ fakaj asocioj, aliĝintaj al U.E.A.; (3) kvin komitatanoj de U.E.A., apartenantaj al minimume tri diversaj nacioj.

(b) Al la propono devas esti aldonitaj : (1) mallonga vivpriskribo de la kandidato kun precizaj plej gravaj datoj kaj kun la eventualaj titoloj; (2) listo de verkoj aŭ studoj eventuale publikigitaj en Esperanto aŭ pri la Internacia Lingvo; (3) priskribo de servoj kaj meritoj kun ĉiuj plej gravaj dokumentoj pravigantaj la proponon.

(c) La proponon kaj ĉiujn aldonojn oni direktas al la Komitato pere de la funkcia prezidanto de U.E.A. plej malfrue tri monatojn antaŭ la Universala Kongreso de Esperanto.

(d) La prezidanto aŭ la komitatano, kiun li aparte komisiis por tiu celo, zorgas pri eventuala kompletigo de la propono kaj funkcias kiel raportanto antaŭ la Komitato.

### III.

La Komitato decidas pri la propono dum la Universala Kongreso. Ĝi povas nomi apartan komisionon por plue esplori la proponon. Ĝi povas prokrasti la decidon se ĝi trovas la proponon nesufiĉe dokumentita.

## KONGRESA REGULARO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(Reviziita en aŭgusto 1955)

### PRINCIPOJ

1. La Universala Kongreso estas internacia manifestacio de la Esperantistaro. Ĝi celas fortigi la solidarecon inter samideanoj, progresigi la movadon kaj studi ĝiajn problemojn.

2. UEA kaj la fakaj organizaĵoj prezentas raportojn al la Kongreso. Krome povas esti prezentataj aliaj raportoj pri temoj Esperantistaj aŭ pri temo de ĝenerala intereso. Laŭ bezono la kongreso diskutas ilin kaj voĉdonas en formo de deziresprimoj, kiuj poste estas traktataj de la Komitato de UEA (La Akademio ankaŭ raportas laŭ ebleco).

3. La Komitato de UEA starigas la Kongresan Regularon.

4. Ordinare okazas unu Universala Kongreso en ĉiu jaro. La kongreso devas esti invitita de loka Esperantistaro pere de ĝia organizaĵo kaj kun la konsento kaj morala aprobo de la koncerna Landa Asocio. La inviton oficiale subtenas ŝtata aŭ urba instanco aŭ grava organizaĵo (kia scienca akademio, universitato, komerca ĉambro ks.).

Laŭ cirkonstancoj UEA mem povas organizi Universalan Kongreson interkonsente kun koncerna Landa Asocio.

5. La Estraro de UEA decidas pri loko kaj tempo de la Universala Kongreso, preparas liston de la traktotaĵoj kaj difinas la laborplanon. La Prezidanto de UEA gvidas la laborkunsidojn. La ĝenerala sekretario de UEA estas ĝenerala sekretario de la laborkunsidoj.

6. La Universalan Kongreson prezidas Prezidentaro konsistanta kutime el :

la prezidanto de UEA,

la vicprezidantoj de UEA,

la prezidanto de la Landa Asocio invitinta la kongreson,

la prezidanto de la Loka Kongresa Komitato,

la prezidantoj de la sekcioj de la kongreso,

la rektoro de la Internacia Somera Universitato de la koncerna kongreso.

## ORGANIZADO

7. La kongreson organizas Loka Kongresa Komitato (LKK) kiun elektas ĝenerala kunveno de la loka Esperantistaro kiu invitis la kongreson. La elekto bezonas la aprobon de la estraro de la koncerna Landa Asocio. Laŭeble LKK konsistu el:

Prezidanto (ĝeneralaj aferoj).

Du Vicprezidantoj (ĝeneralaj aferoj).

Sekretario.

Kasisto.

Komisiito por programo.

Komisiito por loĝigado.

Komisiito por ekskursoj.

Komisiito por informado kaj kongresa gazetara servo. (Eventuale komisiitoj por aliaj aferoj).

Samtempe estu elektitaj 2 revizoroj (el kiuj unu estu revizia fakulo) por kontroladi la librotendon kaj aprobi la finan bilancon.

8. Kontraŭ permeso organizi Universalan Kongreson en sia loko, LKK devigas sin pagi al UEA licencpagon. Tiu sumo estas uzata por la tutmonda propagando de Esperanto laŭ difinoj de la Estraro de UEA.

9. Ordinare okazas dum la Universala Kongreso la jenaj oficialaj aranĝoj, kiujn organizas la Estraro de UEA:

Inaŭguro,

Laborkunsidoj (ĝeneralaj kunsidoj kaj kunsidoj de kongresaj sekcioj difinitaj de UEA),

Internacia Somera Universitato,

Belartaj Konkursoj,

Solena Fermo.

La Estraro de UEA difinas la tagordojn kaj eventuale la specialajn temojn traktotajn dum la oficialaj aranĝoj kaj tiujn detalojn kiel eble plej baldaŭ post decido komunikas al LKK.

Kutime la inaŭguro okazas dum la kongresa dimanĉo, la unua ĝenerala kunsido lundon matene, la kunsidoj de la

kongresaj sekcioj lundon posttagmeze (kaj se necese mardon antaŭtagmeze), la dua ĝenerala kunsido vendredon antaŭtagmeze, kaj la solena fermo sabaton antaŭtagmeze.

10. LKK starigas la programon rilate al aliaj kunvenoj kaj al eksterlaboraj aranĝoj, sed tiu programo devas esti submetata al la aprobo de la Estraro de UEA.

11. La kongresa budĝeto devas ricevi la aprobon de la Estraro de UEA.

12. Al la Universala Kongreso rajtas aliĝi ĉiu Esperantisto kondiĉe ke li rekonu la kongresan ordon, submetiĝu al la leĝoj de la lando, kie okazas la kongreso, kaj ke li faru nenion, kio povus malutili al la kongreso. LKK interkonsente kun la Estraro de UEA havas la rajton rifuzi la partoprenon de iu ajn persono en la Universala Kongreso sen la bezono doni al la aliĝinto motivon por tio. Tamen LKK interkonsente kun UEA rajtas limigi la nombron de Kongresanoj kaj difini limdaton por aliĝo.

13. LKK disponigas salonojn senpage por fakaj kunvenoj al rekonitaj kaj organizitaj fakaj asocioj aliĝintaj al UEA. Salonojn LKK povas laŭ sia bontrovo disponigi al aliaj asocioj kontraŭ pago de la koncerna lupago. Al individuoj LKK ne disponigas salonojn.

14. LKK devas akcepti la Konstantan Kongresan Sekretarion (KKS) de UEA de plej malfrue la 1a de oktobro en la jaro antaŭ la koncerna Universala Kongreso ĝis unu semajno post la kongreso. LKK devas klopodi por akiro de labor- kaj restad-permesoj por KKS por la periodo de lia restado en la lando. LKK se necese devas havigi al KKS konvenan loĝejon kaj laborejon (oficejon). KKS devas ĉeesti la kunsidojn de LKK kaj rajtas tie paroli, sed ne havas voĉdonrajton.

15. KKS respondecas pri sia laboro al la Estraro de UEA. Lia devo estas atenti, ke la preparlaboroj de la kongreso disvolviĝu en la kadroj de la Statuto de UEA, de ĉi tiu Kongresa Regularo kaj de la aprobita budĝeto. Se li rimarkas tiurilatajn deflankiĝojn, li devas pri ili tuj atentigi LKK. En okazo de neinterkonsento KKS sciigas la Estraron de UEA pere de la estrarano komisiita pri kongresoj. Ĝis decido de la Estraro li rajtas rifuzi la plenumon de neregula decido.

16. La adresojn de la kongresanoj oni ne rajtas publikigi aŭ transdoni al iu ajn persono aŭ organizaĵo sen la permeso de UEA.

## Administrado

17. LKK se eble disponigu al KKS kontoron aŭ oficejon, en kiu li faru la kongresan laboron.

18. La tasko de la sekretario estas protokoli la decidojn de LKK. Li devas sendi al la prezidanto, al la komisiito de la Estraro por kongresaj aferoj, kaj al la ĝenerala sekretario de UEA po unu ekzemplero de ĉiu protokolo de LKK.

Tuj en la komenco de la kongresa agado la kasisto kaj/aŭ librotenisto devas komenci la librotenadon. Je alveno de KKS la librotenisto devas montri al li la librojn ĝisdate enskribitajn por konstati ĉu la ĝistia laboro estas farita en la senco de la 15a punkto de ĉi tiu regularo.

KKS faras la rutinajn laborojn de la kongreso (sendo de dokumentoj kongresaj, respondado al rutinaj demandoj per korespondado ks.) kaj zorgas pri la bona ordo en la disvolviĝo de la kongresaj preparoj. KKS faras la statistikon de la kongresanoj kaj ĉiumonate dissendas Oficialan Komunikacion al la Esperanta gazetaro kaj radio-stacioj uzantaj Esperanton. KKS ĉiumonate sendas oficialan raporton pri la evoluo de la kongresaj aferoj al la Komisiito de la Estraro por Kongresaj Aferoj. KKS estas dungita oficisto de UEA kaj estas rekte respondeca al ĝia Estraro pere de la ĝenerala sekretario, sed li devas respekti la aŭtoritaton de LKK en la organizado. LKK siavice rekonas la sperton kaj kompetenton de KKS kaj priatentas liajn konsilojn kaj rekomendojn. La bona harmonio en rilatoj de KKS kaj LKK estas nepre kondiĉo de sukcesa administrado.

19. LKK devas atenti, ke neniu dokumento estu disdonata en la kongreso sen antaŭa aprobo de UEA.

20. KKS devas konservi por UEA po tri ekzempleroj de ĉiu dokumento de la kongreso kaj de ĉiuj presajoj.

21. Senpagaj kongresaj kartoĵoj estas donataj al ĉiuj Komitatanoj de UEA, al la Honoraj Prezidantoj de UEA, al la anoj de LKK, al la administranto de UEA kaj al KKS. "Honorajn" kongresajn kartoĵojn ricevas ĉiuj membroj de la Honora Komitato kaj ankaŭ kelkaj eminentuloj proponitaj de LKK, post aprobo de la Estraro de UEA.

22. LKK eldonas Kongresan Libron, kiu enhavas la oficialan kongresan programon, la tagordon de la Inaŭguro, tagordojn de la ĝeneralaj kunsidoj, programojn de la sekciaj kunsidoj, detalojn de la Belartaj kaj aliaj konkursoj de UEA,

tagordon de la Ferma Kunsido kaj eventuale iajn oficialajn komunikojn de UEA. Aldone al tio LKK povas presigi informojn kaj reklamojn utilajn por la kongresanoj, sed neniajn aferojn, kiuj povus kompromiti la neŭtralecon aŭ reputacion de UEA, kies organo ĝi estas. La kongresa libro estu sendata al la aliĝintaj kongresanoj almenaŭ unu monaton antaŭ la kongreso.

## Financoj

23. La baza kongresa kotizo estas 37.50 anglaj ŝilingoj ĝis la 31a de decembro en la jaro antaŭ la kongresa jaro, 42.5 anglaj ŝilingoj post tiu dato ĝis la 31a de marto en la kongresa jaro, 47.5 anglaj ŝilingoj de tiu dato ĝis la 30a de junio en la kongresa jaro. Post tiu dato LKK ne akceptas aliĝojn. Individuaj membroj de UEA (tiuj membroj, kiuj ricevas minimume la jarlibron) rajtas rabaton de 7.5 anglaj ŝilingoj en ĉiu periodo citita.

La kotizo por edzino de kongresano (aŭ edzo de kongresano) estas la duono de la cititaj prezoj. La rabato por edzo-edzino de membro de UEA laŭ la ĉi-supra difino estas 3.75 anglaj ŝilingoj.

Junul(in)o ĝis 20-jaraĝa kaj la regulaj studentoj (kiuj tion dokumentas per atestilo de la fakultato) pagas trionon de la kotizo.

Blindulo, kies aliĝon akompanas atestilo de blindula asocio aŭ okulkuracisto, ricevas senpagan kongresan karton ĝis la 31a de marto en la kongresa jaro. Ankaŭ la atestita gvidanto de la koncerna blindulo ricevas senpagan karton. Post tiu dato ĉiu koncerna persono pagas po duono de la tiuperioda kotizo.

24. LKK pagas al UEA 25% de ĉiuj kotizoj ricevitaĵoj el kio 15 estas konsiderataj kiel licencpago. KKS devas ĉiumonate sciigi la sumon al UEA per ĝia Administranto kaj enskribi ĝin je la kredito de UEA en la libroj de la kongreso.

25. Eventuala monprofito de la kongreso principe estu uzota por propagandaj celoj. El eventuala profito 50% iras al UEA; 30% al Landa Asocio kaj la resto estas uzata laŭ la decido de LKK.

26. En okazo de deficino rezulte de la kongreso, LKK estas respondeca pri likvido de ĉiuj ŝuldoj.

27. LKK pagas en specialan kason de UEA la sumon de 30 anglaj pundoj. El tiu kaso UEA pagas la vojaĝelspezojn de KKS de unu kongresa urbo al alia. Tiu sistemo garantias justan dividon de la respondeco por tiu elspezo inter la sinsekvaj kongresoj. Vojaĝante de kongresa urbo al kongresa urbo KKS rajtas je duaklasa bileto, kaj se la vojaĝo necesigas tranokton en vagonaro aŭ ŝipo, li rajtas uzi dormkupeon je la kosto de la koncerna kaso.

28. UEA pagas la salajron de KKS fiksitan de la Estraro.

En okazo de monprofito rezulte de la kongreso, LKK post aprobo de la Estraro de UEA rajtas doni al KKS specialan honorarion se oni opinias, ke lia laboro grave influis la rezulton.

# INTERNACIA SOMERA UNIVERSITATO

## Regularo

### Art. 1

(a) La Internacia Somera Universitato (I.S.U.) estas speciala kultura institucio de Universala Esperanto-Asocio. Ĝia celo estas popularigi ĉiujn sciencajn kaj artajn branĉojn pere de la Internacia Lingvo kaj evoluigi la Esperantan sciencajn kaj priartan literaturon.

(b) La I.S.U. funkcias regule dum la U.K. de U.E.A., sed la Estraro rajtas decidi ke ĝi okazu ankaŭ aliloke, ekster la kadro de la U.K.

### Art. 2

(a) En la I.S.U. rajtas prelegi universitataj profesoroj kaj aliaj kvalifikitaj personoj, kiuj havas la rajton instrui en universitatoj aŭ en samrangaj lernejoj laŭ la leĝoj de siaj landoj. Escepte, en la I.S.U. povas prelegi ankaŭ rekonitaj fakuloj pri sciencaj aŭ artaj temoj, sed ilia nombro devas ne superi la nombron de prelegantoj kvalifikitaj por supera instruado.

(b) La prelegoj estas farataj nur en la Internacia Lingvo. Ili daŭru ĉirkaŭ 45 minutojn.

(c) Ĉiu preleganto ĝuas plenan pensoliberecon.

### Art. 3

(a) Komence de ĉiu laborperiodo de la I.S.U. la prelegantoj de tiu periodo elektas la rektoron de I.S.U. por unu jaro, t.e. ĝis la sekva periodo.

(b) La rektoro estu, laŭ la ebleco, ŝtatano de tiu lando en kiu funkcias la I.S.U. dum tiu laborperiodo.

(c) La rektoro prezidas la I.S.U. kaj, kune kun la konstanta sekretario, reprezentas ĝin antaŭ ĉiuj sciencaj kaj kulturaj institucioj, kaj antaŭ la ŝtataj kaj internaciaj aŭtoritatoj dum la periodo de sia ofico.

#### Art. 4

(a) La Estraro de U.E.A. nomas la konstantan sekretarion de I.S.U. por la periodo de tri jaroj, sed li povas esti eksigata de sia ofico ankaŭ pli frue, se la Estraro de U.E.A. tion opinias oportuna. La konstanta sekretario estu universitata profesoro aŭ rajtigita instrui en universitatoj aŭ en samrangaj lernejoj laŭ la leĝoj de sia lando. Li estu membro de U.E.A. kaj, laŭ ebleco, komitatano de U.E.A.

(b) Ĉiuj personoj, kiuj plenumas la kondiĉojn en art. 2 (a) kaj deziras prelegi dum la sekva laborperiodo de la I.S.U., devas sin anonci al la konstanta sekretario de la I.S.U. plej malfrue ĝis la 1-a de Marto, aldonante mallongan biografieton, la titolon de la proponata prelego kaj skizan resumon pri ĝi.

(c) La konstanta sekretario de I.S.U., en interkonsento kun la rektoro, submetos ĉiujn anoncitajn prelegojn plej malfrue la 15-an de Marto al la Estraro de U.E.A. pere de la ĝenerala sekretario de la Asocio. Se la konstanta sekretario aŭ la rektoro opinias, ke unu aŭ pluraj prelegoj ne estas taŭgaj, ĉar ili ne respondas al la principoj de tiu ĉi regularo, ili tion mencias. Surbaze de la faritaj proponoj kaj de la eventualaj rimarkoj de la konstanta sekretario aŭ de la rektoro, la Estraro de U.E.A. fiksos la definitivan programon de la sekva laborperiodo.

(d) Ne povas esti allasita prelego, kiun kaj la rektoro kaj la konstanta sekretario konsideras nekonforma al tiu ĉi regularo.

#### Art. 5

(a) Se la I.S.U. funkcias en la kadro de la U.K., la koncerna L.K.K. havigas konvenajn ejojn, laŭ ebleco en la universitato, prizorgas la necesan diskonigon de la prelegoj kaj antaŭvidas en sia budĝeto la necesajn materiajn rimedojn.

(b) Laŭ la ebleco la Estraro de U.E.A. aranĝas, ke la prelegoj estu ĉiujare presitaj en aparta libro. Ĉiuj prelegantoj transdonas al U.E.A. ĉiujn rajtojn koncerne la faritan lecion. La konstanta sekretario kolektas la manuskriptojn kaj preparas ilin por presigo.

## REGULARO PRI LA BELARTAJ KONKURSOJ DE U.E.A.

#### Art. 1

(1) La Belartaj Konkursoj havas la celon evoluigi la artojn en kaj pere de la Internacia Lingvo. Ili okazas sub aŭspicio de U.E.A. dum la universalaj kongresoj de Esperanto.

(2) La belartaj konkursoj enhavas jenajn branĉojn :

(A) Literatura Sekcio :

(a) Poezio originala (maksimume 108 versoj per 1-3 poemoj)

(b) Poezio traduka (maksimume 108 versoj per 1-3 poemoj)

(c) Prozo originala (maksimume 200 x 65 maŝinskribitaj spacoj)

(d) Prozo traduka (maksimume 200 x 65 maŝinskribitaj spacoj)

(e) Teatraĵo originala (Ludodaŭro maks. 25 min.)

(f) Teatraĵo traduka (Ludodaŭro maks. 25 min.)

(3) La Estraro de U.E.A. povas decidi, ke iu konkurso enhavu ankaŭ aliajn branĉojn aŭ sekciojn, ekzemple muzikon, dancon, fotografion, arton grafikan kaj plastikan k.t.p., laŭ la principoj de tiu ĉi regularo.

#### Art. 2

(1) Rajtas konkursi ĉiu esperantist/in/o, kiu aliĝis al la koncerna U.K. aŭ kiu estas individua membro de U.E.A. —Unu persono povas partopreni per maks. 3 verkoj en la branĉoj prozo kaj dramo. Pri la poezio vidu 2 (A) (a) kaj (b). Por kovri la elspezojn de la korespondado, ĉiu konkursanto aldonu (se tion permesas la poŝtreguloj de lia lando) tri korekte stampitajn respondkuponojn, egale ĉu li konkursas en unu aŭ en pluraj branĉoj.

(2) La konkursanto devas signi ĉiun partoprenaĵon per pseŭdonimo kaj aldoni—se eble, en fermita koverto—slipon kun la pseŭdonimo kaj la vera nomo kaj adreso, eventuale kun la kongresnumero kaj U.E.A. membromarko. Sur la koverto oni skribu nur la pseŭdonimon kaj la branĉo(j)n prenata(j)n.



(3) Nevalidaj por la Konkurso estas verkoj aperintaj en presa formo. Ĉiu konkursanto konsentas, ke la rajto pri unua presigo de premiita verko apartenas al U.E.A., kaj devigas sin ne publikigi ĝin aliloke, krom se U.E.A. rifuzas la presigon. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro.

(4) La tradukaĵoj kopirajtaj devas esti akompanataj de skriba konsento de la posedanto de la kopirajto. U.E.A. ne konsentas pagi tantiemon, se la aŭtoro tion postulas.

(5) La konkursantoj devas liveri al la peranto de B.K. po 4 kopioj de ĉiu el la konkursaĵoj. Ĉe tradukoj oni devas aldoni la saman nombron de la originala teksto. La tuta konkursa materialo devas atingi la peranton plej malfrue la 31-an de marto.

(6) La peranto gardas antaŭ la juĝantoj la identecon de la konkursantoj. Li sendas po unu kompleto da konkursaĵoj al ĉiu juĝanto en la koncerna branĉo, kaj post la finpretigo de la juĝoj li konigas al la sekretario la nomojn kaj adresojn de la partoprenantoj.

### Art. 3

(1) La prijuĝa komisiono konsistas el konstanta sekretario de B.K., el kvar pliaj membroj kaj el du anstataŭantoj. La konstantan sekretarion nomas la Estraro de U.E.A. por la daŭro de 3 jaroj, sed li povas esti eksigita de sia ofico ankaŭ pli frue, se la Estraro opinias tion oportuna. La membrojn de la komisiono kaj iliajn anstataŭantojn nomas la Estraro de U.E.A., post interkonsiliĝo kun la konstanta sekretario, plej malfrue la 31-an de dec. por ĉiu el la sekvaj konkursoj.

Se la juĝa tasko en iu sekcio estas tro peza, la sekretario rajtas dividi la prijuĝon de la poezia kaj proza fakoj inter la komisionanoj. Tamen pli malmultaj ol 3 membroj de unu fako aŭ branĉo ne rajtas decidi pri la konkursaĵoj.

(2) La Komisiono laboras skribe. Ĉiu membro de la Komisiono notas sur ĉiu konkursaĵo la poentojn, kiujn ĝi meritas laŭ lia opinio. La poentoj estas de 0 ĝis 20, tiel, ke la plej bona klasifiko estas 20 kaj la plej malbona 0. La tiel klasifikitajn konkursaĵojn ĉiu membro resendas al la peranto plej malfrue ĝis la 31-a de majo. La konstanta sekretario adicias la poentojn de la unuopaj konkursaĵoj kaj laŭ la nombro de la ricevitaj poentoj en ĉiu branĉo li kon-

statas, kiuj konkursaĵoj estis laŭvice la plej bonaj. La konstanta sekretario informas plej malfrue ĝis la 15-a de julio la premiitojn de ĉiu konkursa branĉo pri la rezulto.

(3) La juĝantaro povas difini malpli ol tri premiojn en iu branĉo. Se ĝi donas en iu branĉo nur du premiojn aŭ nur unu, ĝi decidas, ĉu la premioj estas de unua aŭ dua, resp. tria merito. Premimono ne uzita en iu branĉo povas esti aldonata al alia branĉo.

(4) La juĝa komisiono povas forigi iun branĉon kiel neutilan aŭ jam plene funkciintan.

(5) La membroj de la Komisiono kaj iliaj anstataŭantoj devas aparteni al minimume 5 diversaj nacioj. Ili ne rajtas konkursi, almenaŭ ne en tiuj branĉoj, kiujn ili prijuĝas.

### Art. 4

(1) La gajnintoj legas aŭ legigas la premiitajn verkojn dum aparta kongresa aranĝo, dediĉita al Belarta Konkurso. Tiun aranĝon prezidas la konstanta sekretario de la Belartaj Konkursoj aŭ unu el la membroj de la Komisiono. La aliaj membroj, kiuj ĉeestas la kongreson, troviĝas en la prezidantaro.

(2) La teatraĵetoj povas esti ludataj aŭ legataj. Se temas pri aliaj branĉoj, oni okazigas ekspozicion de la premiitaj verkoj, aŭ alian aranĝon laŭ la karaktero de la koncerna arta branĉo.

(3) En la komenco de la aranĝo la prezidanto solene proklamas la premiitajn verkojn kaj la nomojn de la gajnintoj. Al la gajnintoj li disdonas por ĉiu premiita verko skriban ateston kaj libron—aŭ aliajn premiojn laŭ la decido de la Estraro de U.E.A.

(4) Laŭ ebleco la premiitaj verkoj estos publikigitaj aŭ reproduktitaj en "ESPERANTO."

(5) Ĉiuj artamantoj havas la eblecon donaci apartajn premiojn por unu aŭ pluraj gajnintoj de unu aŭ pluraj konkursaj branĉoj. Tiuj premioj ricevas la nomon laŭ la persono, kiu donacas la premion. Pri allaso de tiuj premioj decidas la Estraro de U.E.A.





